

# IPR

Driemaandelijks tijdschrift  
Afgiftekantoor: Antwerpen X. ISSN 1013-2031

**Jarkolekto 40 - trimonata**

**10/4**

## INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

### Redakta komitato:

József Németh (red.)

Luiza Carol

Luigia Oberrauch Madella

Rob Moerbeek

### Kunlaborantoj

#### de la aktuala numero:

Luiza Carol

Latifou Gbadamassi

Gong Xiaofeng

Zsófia Kóródy

Stefan MacGill

Rob Moerbeek

Johano Petik

Radojica Petrović

Andrzej Pisowicz

Josef Šemer

Jan Willem van Leenhoff



**ilei**

**Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj**

## ENHAVO

|                                                                                          |    |
|------------------------------------------------------------------------------------------|----|
| Jozefo NÉMETH: <i>Enkonduko</i> .....                                                    | 3  |
| Zsófia KÓRÓDY: <i>Instruado, instruistoj – projektoj, novaj vojoj por ILEI</i> .....     | 4  |
| Andrzej PISOWICZ: <i>Esperanto kiel ŝanco por la Kaŭkaza regiono?</i> .....              | 7  |
| Josef ŠEMER: <i>Falsaj amikoj</i> .....                                                  | 14 |
| Latifou GBADAMASSI: <i>Projekto Mondo-Rondo kiel Esperanto-lanĉilo [...]</i> .....       | 16 |
| <i>Global Commons en Esperanto</i> (Jan Willem van LEENHOFF, Rob MOERBEEK) ...           | 20 |
| Luiza CAROL: „ <i>Vojaĝo en Esperanto-lando</i> ” = <i>Vojaĝo hejmen (recenzo)</i> ..... | 23 |
| Johano PETIK: <i>Alvoko al instruistaj ges-anoj</i> .....                                | 25 |
| Xiaofeng GONG: <i>Raporto pri la seminario de ILEI-Ĉinio en Taiyuan</i> .....            | 26 |
| <i>Kvar klasoj – kvar landoj</i> (Stefan MACGILL).....                                   | 30 |
| <i>TORPEDO-6</i> (Zsófia KÓRÓDY).....                                                    | 32 |
| <i>ILEI labortable</i> (Stefan MACGILL) .....                                            | 33 |
| <i>Oktobra estrarkunsido de ILEI</i> (Radojica PETROVIĆ) .....                           | 34 |
| <i>44-a konferenco de ILEI, Kopenhago 2011 (informoj, aliĝilo)</i> (R. PETROVIĆ).....    | 35 |

## ESTRARO DE LA LIGO

**Prezidanto:** Stefan MACGILL, Pannónia u. 30.I.6, HU-1136 Budapest, Hungario.

Tel. (+36 1) 349-5207, <stefan.macgill@gmail.com>.

Eksteraj rilatoj, kunordigo, konferenco, regularoj.

**Vicprez.:** Duncan CHARTERS, PO Box 100, Elsah, Illinois 62028-0100, Usono.

Tel. (+1) 618 3745252, fakso: (+1) 618 3745465, <duncan.charters@gmail.com>.

Universitata kaj scienca agado/komisiono, instru-teknologia evoluo.

**Sekretario:** Małgosia KOMARNICKA, ul. Kilińskiego 14/3, PL-59-300 Lubin,

Pollando, <margareta.ilei.pollando@gmail.com>. Sekretariaj taskoj.

**Estrarano pri financoj:** Julija BATRAKOVA, Rusio/Hago, Nederlando. Tel. (+31)

252 515331, <persiko@mail.ru>. Financaj kaj kasistaj aferoj.

**Estrarano:** Zsófia KÓRÓDY, Esperanto-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412

Herzberg/Harz, Germanio. Tel./fakso (+49) 5521-5983,

<zsofia.korody@esperanto.de>. E-centroj, instrukapabligado, ekzamenoj.

**Estrarano:** Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak,

Serbio. Tel. (+381 32) 371053, fakso: (+381 32) 342101, <radojica.petrovic.rs

@gmail.com>. Edukprojektoj, konferencoj, informado, terminara komisiono.

**Estrarano:** Julián HERNÁNDEZ ANGULO, Arbol Seco 371B e/Clavel y Santo

Tomás, Centro Habana, Ciudad Habana, Tel. (+53) 6404484,

<julian@esperanto.co.cu>. Landa agado, komisiono pri lerneja agado.

---

*Titolpaĝe:* Partoprenantoj de Comenius-projekto vizitis Budapeŝton (vd p.30)

*Dorskovrile:* Seminario de ILEI-Ĉinio en Taiyuan (inaŭguro/fakkunsido) (vd p.26)

---

## ***Scienca Komitato***

**Prezidanto: Humphrey Tonkin**,  
Usono, University of Hartford;  
AdE<sup>1</sup>

**Vicprezidanto: Detlev Blanke**,  
Germanio, Prezidanto de la Societo  
pri Interlingvistiko

### ***Membroj:***

**Vera Barandovská-Frank**,  
Germanio, Universität Paderborn;  
AIS<sup>2</sup> San Marino

**Duncan Charters**, Usono, Principia  
College, Elsay

**Renato Corsetti**, Italio, Università  
degli Studi di Roma „La Sapienza”;  
AdE<sup>1</sup>

**Probal Dasgupta**, Barato, LRU,  
Indian Statistical Institute, Kolkata;  
AdE<sup>1</sup>

**Michel Duc Goninaz**, Francio,  
Université de Provence; AdE<sup>1</sup>

**Aloyzas Gudavičius**, Litovio, Šiaulių  
universitetas

**Wim Jansen**, Nederlando,  
Universiteit van Amsterdam

**Boris Kolker**, Usono; AdE<sup>1</sup>

**Ilona Koutny**, Pollando/Hungario,  
Uniwersytet im. Adama  
Mickiewicza w Poznaniu; AdE<sup>1</sup>

**Maria Majerczak**, Pollando, Uniwer-  
sytet Jagielloński w Krakowie

**Geraldo Mattos**, Brazilo, Federacia  
Universitato de Paranao; AdE<sup>1</sup>

**Aleksandr Melnikov**, Rusio,  
Академия Сельскохозяйственного  
Машиностроения

**Radojica Petrović**, Serbio,  
Univerzitet u Kragujevcu

**Balázs Wacha**, Hungario, MTA  
Nyelvtudományi Intézet

**Sekretario: Aida Čižikaitė**, Litovio

<sup>1</sup> AdE – Akademio de Esperanto

<sup>2</sup> AIS – Akademio Internacia de la  
Sciencoj, San-Marino

## ***Enkonduko***

*Karaj Legantoj,*

Dum la dissendado de la reta  
varianteo ni spertis diversajn proble-  
mojn, kiujn ni nepre devas solvi. En  
pluraj kazoj, la mesaĝoj de nia sekre-  
tario ne atingis la abonantojn, ĉar ili  
iris rekte al la spamujo de la adresito.  
Se vi havas iun ajn problemon pri la  
reta varianteo, kontaktu nian sekreta-  
rion. Por rapidigi la informfluo, vi  
povas sendi kopion de via mesaĝo al  
via sekcio kaj al la redaktoro. Li  
povas helpi vin, se vi havas teknikajn  
problemojn pri la sendita dosiero, aŭ  
se la sekretario ne estus atingebla. Ni  
klopodu kune trovi sekuran metodo  
por la dissendado, sed por tio ni  
devas esti bone informitaj.

En la nuna numero vi trovas plu-  
rajn bonajn artikolojn, kiuj jam ekde  
longa tempo atendis la aperigon, sed  
ĝuste pro ilia longdaŭra valoro ili  
devis ĝis nun cedi sian lokon al pli  
efemeraj materialoj. Krome, kiel  
promesite, nun vi povas legi pli ampleksan  
raporton pri la seminario de  
ILEI-CN (vd. la fotojn dorskov-  
rilajn). En la sekva numero, ni daŭ-  
rigos „la ĉinan temon” kun raporto de  
s-ro Glossop, kies Mondo Rondo es-  
tas abunde menciata ankaŭ en la nuna  
numero. Bonan legadon!

*Jozefo NÉMETH,*  
*redaktoro*

*2 decembro 2010*

### Vojserĉado

Sukcesoj, subvencioj, bonaj rezultoj – estas vortoj, kiujn ni ĉiuj volonte aŭdas, ĉu ne? En la lastaj kelkaj jaroj feliĉe pli kaj pli ofte ni povis legi pri sukcesa lerneja instruado, pri gekolegoj, lernejoj, kiuj ne nur proponis E-kursojn sed strebis je aktiva uzado de la lingvo, je internacia kunlaboro kun alilandanoj, partnerinstitucioj. Kompreneble tio signifas multobligitan kromlaboron, zorgadon pri regulaj kontaktoj unu kun la aliaj. Sed tiu kromlaboro indas la penon: per ĝi ekfunkcias la instruata lingvo, Esperanto estas praktike uzata por ricevo de informoj, interŝanĝo de ideoj, spertoj, travivaĵoj ktp. Ĉio tio ne estas troa novaĵo, ja ĉefa celo de lingvolernado estas komunikado. Tamen, en nia kazo al tiuj ĉi tradicie funkciantaj internaciaj kontaktoj aldoniĝas kroma elemento: personaj renkontiĝoj, reciprokaj vizitoj de la partneroj eĉ subvenciataj de Eŭropa Unio! Financa subteno por lerni kaj uzi Esperanton: do jen novaj ebloj, novaj vojoj por ni ĉiuj.



En la Esperanto-movado ni estas al kutimiĝantaj al volontula, sindediĉa laboro kaj havas malmulte da tempo serĉadi eksterajn financfontojn por nia agado. Ni estas al kutimiĝantaj ankaŭ al tio, ke nia lingvo ofte ne ricevas la samajn rajtojn, samajn ŝancojn, kiel aliaj lingvoj, nia poresperanta laboro ne estas aprezata. Kelkaj ekzemploj el la antaŭaj jaroj tamen pruvis, ke se ni frapas je la ĝustaj pordoj, ili malfermiĝas. La demando estas kie kaj kiel trovi tiujn pordojn? Ni gratulas ĉiujn gekolegojn, kiuj jam trovis vojon al ekstermovadaj subvencioj kaj realigis siajn projektojn, kaj ŝatus instigi aliajn kuraĝe ekpaŝi sur tiu vojo!

### Paŝoj survojjaj

La menciitaj bonaj sukcesoj estas dankindaj al la ellaboritaj projektoj ĝisnunaj, enkadre ekzemple de la t.n. 'Dumviva-Lernado-Programo' (*Lifelong Learning Programme*, LLP) de EU. Temas pri subvenciado de lernado en kaj ekster la lernejaj kadroj, por diversaĝaj kaj diversmaniere, diversnivele edukitaj personoj, grupoj. Temas pri projektoj por lernejoj (Comenius), universitatoj (Erasmus) kaj por plenkreskuloj (Grundtvig). La kadroj por tiuj ĉi instruprogramoj de EU ebligas



partoprenon por edukinstitucioj, organizaĵoj okupiĝantaj pri instruado, klerigado. Je la komenco ne estas facile orientiĝi en la ĝangalo de tiuj EU-programoj, sed indas lerni multon pri ili kaj ekkoni la eblojn kaj kondiĉojn por partopreno. Kion tio instruas al ni, kaj al gvidrolantoj, kaj al membroj de ILEI? Ke ekzistas novaj vojoj, estas maniero, kiel ni povas akiri iom da financa subteno por nia poresperanta agado.

La pioniro sur tiu vojo estis la Comenius-projektoj kun la titolo AKEL (Alternativa Komunikado inter Eŭropaj Lernejoj). Kaj tiun vojon elektis antaŭ ĉirkaŭ tri jaroj Interkultura Centro Herzberg (ICH): reagis al alvokoj, iniciatis, serĉis kaj trovis internaciajn partnerojn por kelkmonata, kelkjara kunlaboro. Estas sekvenda, sekvebla bona modelo, ke por elprovi tiujn eblojn, kvazaŭ testcele ICH entreprenis engaĝiĝon en plurajn agadojn kaj fariĝis unika partoprenanto de LLLP: institucio kun kvar sukcesaj EU-projektoj por diversaj celgrupoj, diversaĝaj partoprenantoj. La rezulto estas promesiga kaj ekzemplodona, jen mallonga resumo:

- Comenius-projekto 2008-2010: 6-9-jaraj infanoj de bazlernejo (kun partneroj el Britio kaj Hungario): per tiu ĉiu 10-14-membra grupo, centoj da samlernejanaj kaj iliaj gepatroj, ĉiuj instruistoj de la lernejo konatiĝis kun E-o, ekhavis rektan personan travivaĵon per ĝi. Kaj la samo okazis en la partnerlernejoj!

- Erasmus-projekto 2009 (kun universitato en Litovio): kvar studentoj pasigis sian praktikperiodon staĝante en Herzberg, kie ili lernis Esperanton kaj spertiĝis pri bibliotekaj, muzeaj, turismaj kaj administradaj, oficejaj taskoj.

- Grundtvig-asistanto-projekto 2009-2010 (kun Pollando) ebligis al staĝanto enrigardon en la multflankan laboron de Interkultura Centro Herzberg, akiron de vivsperto en sociaj, kulturaj, lernejoj, edukaj agadkampoj. Por ILEI tio havis aparte gravan signifon, ja ĝia nova sekretariino povis profundigi sin en asociajn farendaĵojn.

- Grundtvig-projekto 2009-2011 (kun Pollando kaj Slovakio) zorgis kaj zorgas pri la lingva perfektigo de 20-30 plenkreskuloj, aktivigo de la pli aĝa, pli ol 50-jara generacio, donante al ili klerigadon pri uzo de komputilo kaj trejnante ilin fariĝi entuziasmaj aktivuloj, movadaj organizantoj. Dank' al bona kunlaboro de PEA, E@I kaj Interkultura Centro Herzberg ILEI povos fieri pri nova grupo de instrukapablaj gekolegoj, kiuj trapasis KER-ekzamenojn kaj espereble multon faros por disvastigi informojn pri Esperanto kaj konatigos sian ĉirkaŭaĵon kun la internacia lingvo.

## **Kunirado**

Tiuj ekzemploj, tiuj spertoj iĝos komuna valorajo, se ili atingas sian celpublikon. Kompreneble ne estis hazardo, ke ICH iniciatis trakti la temon dum sia Tradicia Oktobra Renkonto Pedagogia (TORPEDO) kaj kun ILEI organizis seminarion pri projektoj kaj subvencipetado en aŭtuno 2010 en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo. Nek la elekto de loko estis hazarda: la supre menciitaj projektoj forte ligiĝas al la loka publiko, lernejoj, familioj, urba administracio, aktivuloj por edukado, junularo kaj kulturo. La spertoj, la pozitivaj rezultoj, sukcesoj en pluraj kampoj kaj sociaj tavoloj helpas la favoran prijuĝon pri Esperanto kaj firmigas la pozicion de la internacia lingvo en la ĉiutaga vivo. Ja la akirita EU-subvencio estas ne por la organizantoj sed por la partoprenantoj de la projektoj, kiuj – ĉu kiel gastoj aŭ trejnitaj, ĉu kiel gastigantoj – rekte ricevis financon subtenon por siaj internaciaj agadoj.

Pro la graveco de serĉado de subvencifontoj, ni denove planas okupiĝi pri la temo. ICH ofertas sian fakan sperton, prezentadon, konsultiĝon ekzemple dum la sekva ILEI-konferenco kaj dum la tago de la lernejo en UK.

## **Pluaj paŝoj**

La koncentrita sukceso de la lingvo, lingvouzantoj en unu loko povas fariĝi precedenco kaj elradii, disvastigi bonan modelon, instigi aliajn grupojn, asociojn, instituciojn fariĝi projektantoj. Tiun strategian rolon planas daŭrigi, pli grandskale realigi ICH ofertante siajn spertojn, sian partnerecon al ILEI. Starigo de organiza centro por ILEI kun helpanto-administranto en Herzberg estos granda paŝo antaŭen kaj certe fariĝos nova katalizanto por kunordigita internacia laboro, por estontaj projektoj. La bonaj lokaj kondiĉoj, la tre pozitiva bildo pri Esperanto kaj la ĵus lanĉita Fondaĵo Esperanto-urbo povos garantii rezultohavan agadon por lingvo-instruado kaj prizorgadon de servoj por ILEI-kolegaro, membraro.

Ĉu ekflugo? Ni esperu!

Ni alvokas vin ĉiujn al komuna agado, realigo de tiuj planoj kaj subteno al la novaj iniciatoj de ILEI. Ek al novaj perspektivoj!

Kunagadante via

Zsófia KÓRÓDY  
*estrarano por ekzamenoj kaj instrukapablo*

## Esperanto kiel ŝanco por la Kaŭkaza regiono?<sup>1</sup>

(memore al profesoro Gurgen SEVAK, vidu la finon de la prelego\*)

de **Andrzej PISOWICZ** (Pollando)

La termino „Kaŭkaza regiono” en ĉi tiu teksto havas larĝan signifon, kiel teritorio situanta norde kaj sude de Kaŭkazo – montĉeno pli alta ol 5000 metrojn, prezentanta la naturan limon inter Eŭropo kaj Azio. La Kaŭkaza montokresto mem, certe ankaŭ konstituas tiun regionon kaj ĝi estas la interna linio, kiu dividas ĝin disde la teritorioj de la Norda kaj Suda Kaŭkazio.



La tuto de la Kaŭkaza regiono estas difinita ne nur laŭ geografio, sed ankaŭ laŭ politiko. Temas pri teritorio, kiu apartenis integre, ekde la komenco de la 19a jarcento ĝis la jaro 1918, al Rusio kaj inter la jaroj 1929 kaj 1991 al Sovetunio. Nun la Norda Kaŭkazio situas en la teritorio de Rusa Federacio. Tiun teritorion konstituas la respublikoj, kies nomoj estas ligitaj kun etnaj grupoj loĝantaj en la respektiva tereno. Tiel progresante de okcidento al oriento, situas proksime unu al la alia la jenaj administraciaj unuoj de Rusa Federacio (nomitaj respublikoj): Adigeio, Karaĉajio-Ĉerkesio, Kabardio-Balkario, Nord-Osetio (Alanio), Inguŝio, Ĉeĉenio, Dagestano.

La teritorio de Suda Kaŭkazio estas dividita en tri sendependajn ŝtatojn: Kartvelio, Azerbajĝana Respubliko kaj Armena Respubliko. Kontraŭe al la unuaj du, la tria ŝtato ne samlimas kun Rusa Federacio kaj ne kuntuŝiĝas kun la kaŭkaza montokresto.

---

<sup>1</sup> La prelego estis prezentita dum la simpozio de ILEI-Konferenco Krakovo 2009. La aŭtoro estas armenologo kaj iranologo; diplomito de la Instituto de Orientaj Studoj en Jagelona Universitato en Krakovo; studis la persan, araban, turkan kaj - dum sia stipendio en Erevano - armenan lingvojn; pliprofundigis siajn spertojn en la armena kaj irana fakoj dum postdiplomaj studoj en Parizo kaj poste ankaŭ en Tehrano; ekde 1970 laboras en la Instituto de Orientaj Studoj en Jagelona Universitato; en la jaroj 1976-94 estis estro de Iranaj Studoj kaj en 1989-94 vicedirektoro de la Instituto; en 1994-95 laboris kiel ataŝeo en la Pola Ambassadejo en Tehrano; partoprenis en multaj internaciaj konferencoj dediĉitaj al la armena lingvistiko kaj instruis armenan dialektologion en la Universitato de Leiden (NL); aŭtoro de ĉirkaŭ 50 sciencaj publikaĵoj; nun instruas la kartvelan gramatikon en la Instituto de Orientaj Studoj en Jagelona Universitato. (Fonto: *ilei.pl*)

La tri ŝtatoj de Suda Kaŭkazio ne estas homogenaj etnografie nek politike. En Kartvelio troviĝas tri regionoj, pri kiuj post la falo de Sovetunio (1991) daŭris konfliktoj, eĉ militoj inter kartveloj kaj la loka loĝantaro subtenata de Rusio, kiu deziris konservi influon en la teritorio elglitiĝanta el ĝia kontrolo.

Tiuj disputeblaj regionoj estas: Abĥazio (la nord-okcidenta parto de Kartvelio), Sud-Osetio (sur la sudaj deklivoj de la centra parto de la Kaŭkaza montaro) kaj Aĝario (la sud-okcidenta parto de Kartvelio). La unuaj du el la menciitaj regionoj proklamis, kun la subteno de Rusio, la sendependecon post la rusa-kartvela milito de aŭgusto 2008. Kontraŭe Aĝario, post dekelkajara periodo de fakta sendependeco de la centraj aŭtoritatoj de Kartvelio, nun agnoskas apartenon al tiu ŝtato kaj estas regata de la registraro en Tbiliso (la ĉefurbo de Kartvelio).

Azerbajĝana Respubliko konsistas el ĉefa parto kun la ĉefurbo Bakuo kaj el malgranda enklavo situanta okcidente de la ĉefa parto de la ŝtato, inter Armenio kaj Irano. Tiu enklavo oficiale nomiĝas: Aŭtonoma Naĥiĉevana Respubliko. Ĝia ĉefurbo estas Naĥiĉevano.

En la okcidenta parto de Azerbajĝano situas disputebla regiono nomata Montara Karabaĥo kun la ĉefurbo Stepanakert (la azerbajĝana nomo de tiu urbo estas *Chankendi*). Post la milito okazinta en la jaroj 1993-94 la lokaj Armenoj, kiuj konsistigas konsiderindan plimulton de la tiea loĝantaro, proklamis la sendependecon de Respubliko de Montara Karabaĥo, ne agnoskita formale de iu ŝtato, sed fakte aliancita kun Armena Respubliko. Sub la kontrolo de Armenoj el Montara Karabaĥo restas iuj regionoj ĉirkaŭantaj ĝin, kiel ekzemple la tiel nomata „Laĉina koridoro” (kun la urbo Laĉin). Tiu distrikto, kiu formale estas armena enklavo, dank’ al Laĉina koridoro, fakte samlimas kun la teritorio de Armena Respubliko, kies ĉefurbo estas Erevano (armene: Jerevan).

En la tereno de Armena Respubliko mem ne estas iu politike disputebla teritorio.

La politikaj limoj dividantaj la regionon de Kaŭkazo disde la respublikoj de Norda Kaŭkazio, apartenantaj al Rusa Federacio, kaj la tri sendependaj ŝtatoj de Suda Kaŭkazio nur pli-malpli kongruas kun la etnaj limoj. Kaj tiuj lastaj ligiĝas kun la lingva aparteco de specifaj nacioj kaj etnaj grupoj. Etne kaj lingve la regiono de Kaŭkazo estas escepte komplika tereno. En teritorio de ĉirkaŭ 300 mil kvadrataj kilometroj, do preskaŭ tiel granda kiel ekzemple Pollando, loĝata de ĉirkaŭ 16 milionoj da homoj, estas uzataj pli-malpli eĉ 50 diversaj lingvoj. Sekve, tio estas regiono, en



kiu devas esti uzataj lingvoj kun transnacia statuso, uzataj dum reciproka komunikado inter la loĝantaraj grupoj, kiuj uzas en sia propra medio la propran lingvon. Antaŭ ol ni proponos propagandi Esperanton kiel lingvon, kiu povus anstataŭi la rusan, funkciintan ĝis antaŭ nelonge kiel *lingua franca*, ni rigardu de pli proksime la aktualan lingvan situacion de la Kaŭkaza regiono.

La plej grandan lingvistikan makro-grupon de la Kaŭkaza regiono konsistigas ibero-kaŭkaziaj lingvoj. La unua parto de tiu nomo ligiĝas al la antikva Iberio, lando situanta en la centro de Kartvelio (nuntempe: Kartlia). Tiu makro-grupo konsistas el ĉirkaŭ 40 lingvoj (resume, kiel supre menciite, en la Kaŭkaza regiono oni parolas ĉirkaŭ 50 lingvojn).

La komuna origino de la ibero-kaŭkaziaj lingvoj ĝis nun ne estis pruvita, do rilate al tiuj lingvoj ni ne uzas la terminon „lingva familio”, kiu ampleksas lingvojn parencajn unu al la alia kaj devenantajn el unu pralingvo (tian familion konstituas ekzemple la hindoeŭropaj lingvoj).

En la sfero de la ibero-kaŭkazia makro-grupo oni povas distingi tri grupojn:

1. okcident-kaŭkaziaj lingvoj (alie: Abĥazo-Adiga grupo)
  2. orient-kaŭkaziaj lingvoj (alie: Ĉeĉeno-Dagestana grupo)  
kun du subgrupoj:
    - a) centra (Naĥa) kaj
    - b) nord-orienta (Dagestana)
  3. sud-kaŭkaziaj lingvoj (alie: Kartvela grupo)
- Jen pli detala superrigardo de la specifaj grupoj:

Al la unua apartenas la lingvoj: abĥaza (uzata en Abĥazio – Nord-Okcidenta Kartvelio), abaza (en Karaĉaj-Ĉerkesio), adigea (en Adigeio) kaj kabardio-ĉerkesa (en Kabardio-Balkario kaj Karaĉaj-Ĉerkesio).

La dua grupo konsistas el du subgrupoj. La Centra subgrupo (Naĥa) ampleksas la proksime parencajn lingvojn: la ĉeĉenan (origine: *noĥĉi*) kaj inguŝan. La Nord-Orienta grupo (Dagestana) ampleksas multajn lingvojn, el kiuj la plej gravaj estas: la avara, lezga, laka, dargana kaj tabasarana.

En la tria grupo (Kartvela) dominas la kartvela lingvo (origine: *kartuli ena*). La lingvoj parencaj kun ĝi estas la: megrela kaj svana, uzataj parole de konforme nomataj (Megrel, Svan) subetnaj grupoj en la sfero de la kartvela nacio. Megreloj loĝas en Okcidenta Kartvelio, en parto de la teritorio de la antikva Kolĥido. Kontraŭe, svanoj loĝas alte en la montaroj, en la regiono de Kartvelio kiu nomiĝas "Megrelio kaj Supra Svanetio",

situanta rekte oriente de Abĥazio. Skribe megreloj kaj svanoj uzas la kartvelan (kiun, kompreneble, ili scipovas ankaŭ parole).

Al la homogena skriba versio de la kartvela literatura lingvo, en individuaj regionoj konformas pluraj senskribaj dialektoj. Unu el ili estas uzata de Aĝaroj, kies prauloj apartiĝis el la kartveloj sekve de akcepto de islamo. Skribe Aĝaroj uzas la kartvelan lingvon.

Laŭ la nombro de la loĝantaro uzanta respektivan lingvon, en la sfero de la ibero-kaŭkazia makro-grupo, plej gravas la kartvela, parolata de ĉirkaŭ kvar milionoj kaj duono da homoj. La duan pozicion okupas la ĉeĉena (ĉirkaŭ 900 mil uzantoj), kaj la trian – la avara (pli ol duonmiliono da uzantoj).

Se temas pri literaturaj tradicioj, nur la kartvela estis notita skribe jam en la antikva tempo: komencante ekde la kvina jarcento, lige kun la akcepto de kristanismo en Kartvelio en la unua duono de la kvara jarcento. Ĝis hodiaŭ kartveloj uzas la originalan propran skribon, kiu nuntempe estas bazita sur 33 literoj (sen distingo de majuskloj kaj minuskloj). Tiuj literoj aspekte estas similaj nun al malgrandaj rondetoj (en la antikva tempo ili estis pli precize dirite krudrande-rektangulaj).

La aliajn lingvojn de la ibero-kaŭkazia makro-grupo oni komencis noti nur en la 20a jarcento. Tiuj lingvoj uzas la kirilan alfabeton (la rusan skribon), kompletigitan per suplementaj signoj servantaj por noti konsonantojn nekonatajn en la rusa (antaŭ ĉio temas pri la tiel nomataj glotigitaj konsonantoj).

Iuj lingvoj, uzataj de malgrandaj etnaj grupoj, ĝis hodiaŭ ne estas notitaj skribe, kiel ekzemple la ĥinaluga lingvo, parolata de apenaŭ du mil homoj. Ĝiaj uzantoj skribe utiligas aliajn lingvojn, ekzemple la loĝantoj de la vilaĝo Ĥinalug, kiuj nomas sin *ketŝ*, interparolas kun si ĥinaluge, kaj por kontaktoj kun aliaj nacioj, ili uzas ĉefe la azerbajĝanan el la tjurka grupo (vidu sube). Por multaj el ili la azerbajĝana iĝas preskaŭ la gepatra lingvo.

La ibero-kaŭkaziaj lingvoj konsistigas la plej malnovan lingvan tavolon de la Kaŭkaza regiono. Post ili, en la unua jarmilo antaŭ Kristo en tiu teritorio aperis lingvoj apartenantaj al la hindeŭropa familio, kiu ampleksas interalie la latinidajn, ĝermanajn, slavajn, la grekan, kaj la tiel nomatajn ariajn lingvojn: hindariajn kaj iranajn.

Kronologie la unua hindeŭropa lingvo en la Kaŭkaza regiono estis la armena (origine: *hajeren*), notita skribe komence de la 5a jarcento lige kun la akcepto de kristanismo inter armenoj komence de la 4a jarcento. Armenoj uzas la originalan alfabeton prilaboritan de la monako Mesrop

Maŝtoc proksimume en la jaro 400. Tiu alfabeto nombras nun 38 literojn (majusklojn kaj minusklojn), baziĝantajn sur krudrandaj (ofte rektangulaj) formoj.

La armena lingvo apartenas al la hindeŭropa familio, kiel ĝia unika, izolita elemento, simile kiel ekzemple la greka. Alivorte, kaj la greka kaj la armena ne havas iujn proksimajn lingvajn "parencojn" kaj estas ligitaj al la ceteraj hindeŭropaj lingvoj pli malproksime ol ekzemple la slavaj lingvoj inter si.

La nombro de armenoj en la mondo, konsiderante amasan elmigradon el Turkio (post la genocido, kies viktimo iĝis konsiderinda parto de la armena loĝantaro de tiu ŝtato en 1915) verŝajne sumiĝas je pli ol ses milionoj da homoj. En Armena Respubliko loĝas ĉirkaŭ tri milionoj da ili.

La hindeŭropaj lingvoj, kiuj apartenas al la irana subgrupo (en la sfero de tiel nomataj ariaj lingvoj) estas interalie: la oseta kaj la kurda. La osetan parolas ĉirkaŭ 600 mil osetoj sur la nordaj kaj sudaj deklivoj de la centra Kaŭkaza montaro. Ili nomas sin mem *iron*, kaj sian lingvon: *iron ævzag* (*aevzag*). Ili estas posteuloj de la antikvaj skitoj kaj mezepokaj alanoj, kiuj antaŭ la fino de la unua jarmilo de la kristana erao loĝis norde de Kaŭkazo, en stepoj de Ukrainio kaj Suda Rusio.

La dua el la iranaj lingvoj de la Kaŭkaza regiono estas la kurda (origine: *kurdi*), uzata de kurdoj kaj jezidoj (religia grupo) en Armenio. Ili uzas, simile kiel osetoj, la rusan skribon.

La hindeŭropa lingvo, kiu en la Kaŭkaza regiono de antaŭ ducent jaroj ludas grandegan rolon, estas la rusa. Ĝis hodiaŭ ĝi estas la oficiala lingvo en Rusa Federacio, al kiu apartenas la respublikoj de Norda Kaŭkazio. Ĝis 1991 ĝi estis ankaŭ la oficiala lingvo, paralele al la kartvela, azerbajĝana kaj armena, en Kartvelio, Azerbajĝano kaj Armenio, kiuj estis uniaj respublikoj kunkonsistantaj Sovetunion.

La ruslingva enmigranta loĝantaro ne konsistigas plimulton en la Kaŭkaza regiono, sed la rusa lingvo ĝuas tre altan kulturan prestiĝon kaj estas uzata grandparte kiel la baza lingvo de interkompreniĝo por la loĝantoj de la Kaŭkaza regiono, kiuj uzas diversajn lokajn lingvojn. En la tuta Kaŭkaza regiono ekzistas ruslingvaj lernejoj, en kiuj kleriĝas ne nur la junularo parolanta ĉiutage ruse, sed ankaŭ pluraj uzantoj de aliaj lingvoj. Unu el la kialoj de tiu situacio estas la fakto, ke la rusa lingvo – kontraŭe al la lokaj lingvoj – certigas aliron al la monda literaturo, same al beletra kaj scienca literaturo (teknikaj, medicinaj studoj ktp.)

Post la hindeŭropa, la sekva tavolo de lingvoj, kiuj aperis dum

jarcentoj en la Kaŭkaza regiono, estas – sufiĉe parencaj unu al la alia – la tjurkaj lingvoj. Laŭ la nombro de la uzantoj kaj prestiĝo, la plej grava inter ili estas la azerbajĝana, la oficiala lingvo de Azerbajĝana Respubliko. Ĝis la komenco de la 20a jarcento, la Kaŭkazaj azerbajĝanoj (tiam nomataj „Kaŭkazaj tataroj”) uzis la araban skribon, same kiel iliaj parenclingvanoj – turkoj. Dum la periodo de Sovetunio, por noti la azerbajĝanan oni uzis komence la latinan skribon, kaj poste – la rusan. Ekde la komenco de la 21a jarcento azerbajĝanoj uzas denove la latinan alfabeton, en la versio modelita laŭ la turka alfabeto (uzata en Turkio).

La azerbajĝanoj estas la plej multnombra nacio de la Kaŭkaza regiono. Ilia suma nombro estas taksita je ĉirkaŭ 23 milionoj da homoj. El tiu nombro, preskaŭ 8 milionoj loĝas en Azerbajĝana Respubliko kaj la ceteraj 15 milionoj en Nord-Okcidenta Irano.

Al la tjurka lingvaro – krom la azerbajĝana – apartenas kelkaj lingvoj de Norda Kaŭkazio: karaĉaja (en Karaĉajio-Ĉerkesio), balkara (en Kabardio-Balkario) kaj kumika (en Dagestano).

Al la supre prezentita etno-lingva klasifiko de la Kaŭkaza regiono surmetiĝas religiaj subdividoj. Kristanoj estas (krom rusoj) kartveloj (sen kalkuli la muzulmanajn aĝarojn), armenoj kaj ankaŭ la plimulto de osetoj kaj parto de la abĥazoj. Krom armenoj, tiuj kristanoj estas ortodoksuloj. Kontraŭe, armenoj apartenas al la Armena Apostola Eklezio, kiu ne estas parto de la grupo de ortodoksaj eklezioj.

La osetoj, kiuj parolas digoran dialekton, estas muzulmanoj, simile kiel la cetero de la loĝantaroj de la Norda Kaŭkazio (kompreneble krom rusoj) kaj parto de la abĥazoj. Ankaŭ azerbajĝanoj estas muzulmanoj.

Kiel menciite supre, ĝis antaŭ nelonge la rusa ludis oficiale la rolon de interreta lingvo en la Kaŭkaza regiono kaj nuntempe ankoraŭ ludas la saman rolon, sed ne ĉiam oficiale. Tamen troviĝas esceptoj de tiu regulo. Ili rilatas al etnaj grupoj, kiuj interkontaktiĝis jam antaŭ la anekso de la Kaŭkaza regiono al Rusio, do antaŭ la 19a jarcento.

Ekzemple armenoj loĝantaj en la teritorio de la nuna Azerbajĝana Respubliko, por kontaktoj kun azerbajĝanoj ofte uzis la azerbajĝanan anstataŭ la rusan. Azerbajĝane ofte interparolas ankaŭ uzantoj de diversaj ibero-kaŭkaziaj lingvoj de la Dagestana grupo.

Kurdoj en Armenio parolis kaj plu parolas kun armenoj ĉefe en la armena, la lingvo kiu iĝis por ili la dua post la gepatra (la tria ofte por ili estas la rusa).

Ĝis antaŭ nelonge la armenoj, kiuj loĝas en la distrikto Ĝavaĥeti en

la Suda Kartvelio, por kontaktoj kun kartveloj uzis la rusan, kaŭze de sia nesufiĉe bona scio de la kartvela. Tiu situacio lastatempe perturbiĝis. La kartvelaj aŭtoritatoj komencis uzi la kartvelan por la korespondo kun lokaj armenaj aŭtoritatoj de Ĝavaĥeti. Tio vekas malkontenton de la armena loĝantaro kaj intensigas la separatisman agordon: la ideon pri anekso de tiu distrikto al Armenio.

Laŭ tiu ekzemplo oni vidas, ke la valoro de la rusa lingvo kiel *lingua franca* malaltiĝas en la Kaŭkaza regiono. Tiun proceson akompanas samtempe la kreskanta rolo de la angla kiel internacia lingvo, precipe en la sendependaj ŝtatoj de la Suda Kaŭkazio. Dum la lastaj jaroj kreskis la politika influo de Usono en Kartvelio kaj Azerbajĝano. En Kartvelio tio rilatas al la tendencoj de tiu ŝtato serĉi en la Nord-Atlantika Traktat-Organizo kontraŭpezon kontraŭ la dependeco de Rusio. En Azerbajĝano la influo de Usono rilatas al la interesiĝo de usona kapitalo pri la petrola riĉo de tiu lando kaj al ĝia najbareco al la malamika, kontraŭusona – Irano. Kontraŭe, en Armenio, kvankam la simpatioj de la aŭtoritatoj estas orientitaj al Rusio, la rolon de la angla lingvo kreskigas en tiu lando intensaj kontaktoj kun la armena emigracio, kiu multnombro loĝas en Usono (precipe en Kalifornio).

En tiu situacio de malkreskanta rolo de la rusa lingvo en la Suda Kaŭkazio, kaj ankoraŭ rilate la malaltnivelan scipovon de la angla en la tuta Kaŭkaza regiono, la ŝanco por disvastigo de Esperanto kiel interreta lingvo povas kreski, kondiĉe ke ĝi estos subtenata per agado de influaj centroj de aŭtoritato kaj edukado. Tiaj valoroj de Esperanto, kiaj estas la neŭtraleco kaj facileco de lernado, povas montriĝi konkurencaj al la proponoj de altrudado de la kartvela lingvo, tre malfacila por fremduloj, en rilatoj de aŭtoritatoj de tiu ŝtato kun abĥazaj, osetaj aŭ armenaj separatistoj.

Tia ŝanco estas videbla jam de kelkaj jaroj (ekz. interesiĝo pri Esperanto en la medio de poloj loĝantaj en Armenio), kvankam dume la lanĉado de edukado de Esperanto renkontas malakcepton. Ekzemple somere 2005 oni planis organizi Esperantan konferencon en la ĉefurbo de Dagestano, Maĥaĉkala, sed ĝi ne efektiviĝis kaŭze de minaco de bomba atenco. Verŝajne por iuj potencoj gravis torpedi la promocion de Esperanto. Sekve, necesas ŝanĝi la strategion, profitante de la sperto de kaŭkaziaj esperantistoj.

\*) Unu el ili estis armeno, prof. d-ro Gorgen SEVAK, kiu vere nomiĝis Grigorjan (Sevak estis lia pseŭdonomo). Sekve, precize lia antaŭnomo kaj familia nomo estis:



Gurgen Grigorjan. Li naskiĝis en Tbiliso en 1904 kaj mortis en Erevano en 1981. Ekde la jaro 1948 li estis doktoro, profesoro de la armena lingvo en la Erevana Universitato. De 1971 membro de la Scienca Akademio de Armena SSR. Li scipovis samnivele tri naturajn lingvojn: la armenan, la kartvelan, la rusan kaj la internacian lingvon E-o. En la jaroj 1929-36 li estis prezidanto de Armena E-Asocio. Ekde 1932 li estis membro de Akademio de E-o. Li tradukis el la armena al E-o armenajn poeziaĵojn, interalie la faman (ankaŭ por polaj legantoj) poemon de Avetik Isahakian, titolatan "Abu-Lala Mahari". El tiu E-traduko ekestis la tradukoj al la japana kaj hebrea. Li estis entuziasmulo pri E-o kaj se Stalin ne estus persekutinta la sovetajn esperantistojn (kadre de altrudo de la rusa en sia imperio), li certe farus ankoraŭ pli multe ol tion, kio montriĝis ebla, por daŭrigi la verkon de Ludoviko Zamenhof en Armenio.

La aŭtoro de ĉi tiuj vortoj en la jaroj 1961-63 estis studento de profesoro Gurgen SEVAK en la Ŝtata Universitato en Erevano, la ĉefurbo de Armena SSR. Profesoro G. SEVAK estis la gvidanto de la katedro de la armena lingvo, kiun lernis tie la subskribanto de ĉi tiu teksto, dezirante ke tiu lingvo en la estonteco estu objekto de liaj esploroj. Ĉi tiu teksto estu la postmorta dankesprimado de la aŭtoro de ĉi tiuj vortoj por sia majstro, profesoro Gurgen SEVAK, kiu estis nobla kaj saĝa homo!

## Falsaj amikoj

Resumo pri prelego de **Josef ŜEMER** (Israelo)  
*dum la ILEI-konferenco, Kubo 2010.*

Temis pri 50-minuta prezentado de 30 ekzemploj de „Falsaj amikoj”, kiuj estas ofte uzataj en Esperanto de diverslingvaj esperantistoj.



Ekzemple, franclingvaj esperantistoj ofte uzas en Esperanto la verbon „demandi” anstataŭ „peti” („Mi demandis helpon de li”), hispanlingvanoj parolas pri aĉeto en „merkato” anstataŭ „bazono”, anglalingvanoj emas uzi „scii” anstataŭ „koni” („Mi scias lin”) ktp.

Difino de „Falsa amiko”: Falsaj amikoj estas paroj de vortoj en du lingvoj, kiuj aspektas kaj/aŭ sonas simile, sed estas malsimilaj laŭsignife.

*Jen ĉiuj ekzemploj prezentitaj kaj analizitaj dum la prelego:*

1. **kampo** - La soldato loĝas en la **tendaro**, apud la **kampo**.
2. **oferi** - La restoracio **ofertas** bonajn picojn. Abrahamo preskaŭ **oferis al Dio** sian filon.
3. **signo, signi** - Jozefo **subskribis** la ĉekon. Tio estas bona **signo**!
4. **rajto** - Vi ne **pravas**, sed vi **rajtas** erari!
5. **aeropor**to - En la **flughaveno** oni ne **portas aeron**...
6. **kurso** - En la **kurso** ni lernis pri la **kurzo** de la dolaro.
7. **merkato** - Dina vizitis la **bazon** kaj eksciis, ke estas krizo en la **merkato** de la vestoj.
8. **krii** - „Ne **ploru**, Argentino”, **kriis** la homamaso.
9. **kurioza** - Mi volas rakonti al vi ion **kuriozan** (kuriozaĵon). Ĉu vi estas **scivola** aŭdi ĝin?
10. **fronto** - La soldato iris al la **fronto** kaj vundiĝis ĉe la **frunto**.
11. **estimi** - **Estimu** la taksiiston. Li estas tre **estimata** persono. Ĉu vi povas **taksi** lian aĝon?
12. **adolto** - La filmo estas permesata nur al **adoltoj**, ĉar ĝi temas pri **adulto** farita de la edzo.
13. **guverni** - La riĉaj membroj de la **registaro** tenis **guvernistojn**, kiuj **guvern**is (= edukis kaj instruis) iliajn infanojn.
14. **kontroli** - Li malfacile **regas** la situacion, sed tamen li sukcesas **kontroli**, ĉu lia edzino estas hejme.
15. **medio** - Niaj **amaskomunikiloj** ofte raportas pri la krizo de la **vivmedio**.
16. **negoci** - Dum la ministro **intertraktis** kun la loka ministro, la direktoroj de la komercaj kompanioj **negocis** kun siaj alilandaj kolegoj.
17. **korespondi** - Mi **korespondas** kun bel(e)ga amikino, sed ŝia konduto ne **respondas** al mia konduto.
18. **vehiklo** - Ĉar li estas **vehiklo** de tiu malbenita malsano, oni timis porti lin per la **veturilo**.
19. **demandi** - Mi **petis** ŝin **demandi** en la akceptejo de la hotelo, kie troviĝas Martin.
20. **ekskuzi** - Mi **ekskuzis** mian malbonan agon kaj fine li diris, ke li **pardonas** al mi.
21. **kapitalo** - La firmao, kies oficejo troviĝas en la **ĉefurbo**, deziras pligrandigi sian **kapitalon**.
22. **romano** - La **romano** priskribas belan fantazian **amaferon** inter **romano** kaj **romanino**.

23. **atrakcio** - Tiu ĉi spektaklo ne estas tre **alloga**, sed tamen ĝia lasta parto estas vera **atrakcio**.
24. **standardo** - Laŭ la **normo** reganta en ilia armeo, ĉiu arma divizio havas sian **standardon**.
25. **fantasta** - En la **fantastaj** fabeloj vi povas legi pri **fantaziaj** homoj kaj bestoj.
26. **ignoranto** - Mia direktoro ne volas scii pri la krizo kaj intence ne atentis ĝin (li estas **ignoranto**), sed tio ne signifas, ke li estas **malklerulo** kaj **sensciulo**.
27. **aŭdienco** - La preleganto rakontis al la **aŭskultantoj**, ke li havas **aŭdiencon** ĉe la ministro pri kulturo.
28. **mobila** - Li mendis per sia **portebla** telefono ornamaĵojn por la balo, inkluzive de **mobiloj**, kiujn li intencas pendigi super la dancterenon.
29. **korekti, korekta** - En la **korekta** domo vivas deliktuloj. Ili lernas la **ĝustan** vivmanieron.
30. **mapo** - Li metis la **mapon** de Kubo sur la **tablotukon**.

## Projekto *Mondo-Rondo* kiel Esperanto-lanĉilo en la infana mondo en la tria mondo ĉefe en Afriko

de **GBADAMASSI Latifou**<sup>2</sup> (Benino)

*Por komenci, kion signifas Mondo-Rondo?*

*Mondo-Rondo* estas internacia bildkarta/desegnaĵa interŝanĝo pri monda geografio inter grupoj de infanoj kaj junuloj.

*De kie ĝi devenas?*

La historio de la projekto *Mondo-Rondo* parte estas la historio de la laboro de Charlotte KOHRS, kiu loĝis en San-Diego, Kalifornio, Usono, dum la lasta parto de sia vivo. Charlotte estis instruistino de infanoj, aparte de tiuj kiuj havis problemojn rilate al legado. Post la morto de sia edzo en 1982, Charlotte, tiam 72-jaraĝa, ekinteresiĝis pri E-o. Efektive, ŝia revo instrui E-on al infanoj ĉirkaŭ la mondo donis al ŝi novan vivon dum dudek jaroj.

---

<sup>2</sup> La prelego estis prezentita dum la simpozio de la 41-a ILEI konferenco en Porto-Novo (Benino) 2008. – NdIR

En majo 1987, Charlotte kaj kelkaj amikinoj en Kalifornio fondis la organizaĵon *Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo* por pligrandigi la grupon de tiuj kiuj antaŭenigas la lingvon E-o. Jen la tri pli specifaj celoj de la organizaĵo:

- 1) enkonduki E-on al infanoj en Usono kaj aliaj landoj;
- 2) iĝi ponto inter infanoj kiuj lernas E-on en diversaj landoj;
- 3) krei kaj distribui, senpage aŭ malmultekoste, materialojn al instruistoj de E-o kaj samtempe instigi la interŝanĝon de bildkarto kaj similaj materialoj inter lernantoj en diversaj landoj.



Charlotte kreis tri diversajn projektojn por infanoj, kiuj lernas E-on:

1) *Mondo-Rondo*

Ĝi komenciĝis en 1991. Grupoj, kutime klasoj, kiuj volis interŝanĝi bildkartojn, kontaktis Charlotte, kaj ŝi sendis al ili liston de la nomoj kaj adresoj de la gvidantoj de la aliaj grupoj, kiuj indikis intereson pri la projekto.

2) *Monda Stelaro*

Ĝi estas projekto por individuaj infanoj. Ĝi komenciĝis en 1994. Por fariĝi „Stelo”, la lernanto devas lerni 200 vortojn kaj lerni starigi dek bazajn

demandojn. Krome, ĉiu lernanto promesis korespondi Esperante kaj ankaŭ instrui E-on al alia persono dum almenaŭ 15 minutoj semajne. Ĉiu stelo ricevis atestilon de Charlotte.

### 3) *Ago-Tago por Infanoj*

Dum la dua aŭ tria semajno de la monato februaro por festi la „Semajnon de Internacia Amikeco”, ĉiu lernanto devis kanti (kun aliuloj se eblas) la kanton „Sur la Tero”, kiu uzas la francan melodion „Frato Jako”. Charlotte aŭtoris tiun kanton aparte por „Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo”.

### *Kiaj materialoj estis uzataj?*

Notindas, ke Charlotte Kohrs eldonis aron da instrumaterialoj tre utilaj kaj valoraj kaj ankaŭ verkis siajn proprajn. Temas pri:

- *Kantu Esperante kun Janico kaj Johano*: 12 konversaciaj instru-kantoj por komencantoj
- *Bonvenon, Amiko, ĉu vi parolas Esperanton? kaj Bonvenon kaj saluton! Parolu Esperanton kun ni*’ estas du bildlibretoj, kiuj entenas kelkajn grandajn desegnaĵojn de infanoj.
- *Ni Esploru la Mondon!* eldonita en 1991, estas nova speco de libreto por infanoj, en kiu lernantoj kaj instruistoj en diversaj landoj desegnis bildojn kaj verkis paĝojn kun demandoj kaj respondoj pri siaj propraj landoj.
- *La bela Planedo* estas bonega libro kun desegnaĵoj de infanoj, kiu ne nur instruas la lernantojn pri geografio kaj naturo sed ankaŭ vekas bonan sintenon al la mondo kaj al prizorgado de ĝi.
- *Dek Demandoj* eldonita en 1993 estas lernolibro por infanoj 7- ĝis 14-jaraj. En ĝi ĉiu leciono estas kombino de demandoj kaj respondoj, kaj en la tuta libro oni lernas demand-vortojn de E-o. Notindas, ke ĉi tiu libro estas por angle-parolantaj instruistoj kaj lernantoj.
- *ABC en Esperanto* verkita de Charlotte Kohrs en 1994, estas libreto en kiu estas unu aŭ du vortoj de ĉiu litero de la alfabeto. Ĝi enhavis kolorigendajn desegnaĵojn faritajn de James Faughnan, kiu multe helpis Charlotte dum ŝiaj lastaj jaroj, kaj estas lerte uzita de ŝi por instrui ne nur pri la alfabeto, sed samtempe pri diversaj gramatikaj punktoj.
- *Flugu kun Petro*: La lasta libreto, aperinta en 1995, kiun Charlotte verkis por infanoj. La temo estas ke Petro povas flugi tra la tuta mondo en sia magia vagono, Esperanto. Ankaŭ ĝi entenas multajn desegnaĵojn faritajn de James Faughnan.

### *Kiamaniere tiu projekto atingis Beninon?*

En la jaro 1999, Charlotte opiniis, ke ŝi ne plu povas estri *Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo*, ĉar ŝia sano ne plu permesas tiom da laboro. Sekve, ŝi petis Darlene Evans estri la organizaĵon. Darlene, kiu loĝas en Indianola, Iowa, en la meza parto de Usono, akceptis la taskon, sed bedaŭrinde ŝi tre baldaŭ devis rezigni pro neantaŭviditaj gravaj san-problemoj.

En la jaro 2001, s-ro Ronald Glossop akceptis la taskon esti la nova direktoro de *Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo*. Lia ĉefa tasko estas informi ĉiujn pri la bonaj materialoj, kiujn Charlotte kreis kaj daŭrigi la projektojn, kiujn ŝi komencis. Resume, la alveno de la projekto *Mondo-Rondo* en Benino estas la frukto de la rilatoj inter Ronald Glossop kaj mi. Fakte li produktis/as kaj sendis/as senpage al mi pakaĵojn da novaj ekzempleroj de la libroj kaj sonbendoj verkitaj kaj eldonitaj de Charlotte inkluzive de paperaĵoj, skribiloj, kraĵonoj ktp.

Ekzemple pakaĵo sendita en 2006 entenis materialojn, kiuj valoris 50 US dolarojn kaj sendkostoj estis 34.25 US dolaroj. En 2007, materialoj senditaj valoris 110 US dolarojn kaj sendkostoj estis 120 US dolaroj. Aliaj materialoj senditaj samjare el Nederlando valoris almenaŭ 250 eŭrojn kaj sendkostoj estis 34 eŭroj. En la jaro 2008, ili valoras 334 US dolarojn kaj sendkostoj estas 71.20 US dolaroj. La 2-an de oktobro 2008, aldoniĝis monhelpo je 150 eŭroj por subteni mian agadon. La agadkampo konsistas nuntempe el la tri jenaj lernejoj:

- Mezgrada ŝtata lernejo Ayahohoué (ajahohue): de la studjaro 2006-2007
- Duagrada ŝtata lernejo Azove: de la studjaro 2006-2007
- Privata Bazlernejo „HOUELO” Hondjin (Honĝin): de la studjaro 2007-2008

Inter la jam trastuditaj libroj oni povas mencii: *Flugu kun Petro; Bonvenon, Amiko!; La Bela Planedo; Ni Esploru la Mondon; ABC en Esperanto; Kantu esperante kun Janico kaj Johano* plus sonbendo/kasedo.

Post dujara agado la lernantoj:

- kapablas, uzante bazan vortprovizon, paroli libere per amuzaj dialogoetoj kaj ludoj;
- kapablas, uzante diversajn mapojn kaj jam konatajn vortojn pri monda geografio, situigi multajn lokojn. (la lumdiskoj, kiujn mi kunportis kaj projekciigis tion pruvas);

- povos skribi kaj legi mallongajn mesaĝojn;
- akiris atestilojn tiel iĝante steletoj.

Krome, mi ekspoziciis diversajn desegnaĵojn faritajn de E-lernantoj el la tri lernejoj. Ili vere allogis la ĉeestantojn, kiuj ilin filmis.

Jen niaj preferoj:

- Interŝanĝi, prefere perpoŝte, bildkartojn, desegnaĵojn, mallongajn mesaĝojn, leterojn kun aliaj grupoj de infanoj kaj junuloj tutmonde,
- ricevi pliajn ĉiuspecajn materialojn,
- monhelpo por faciligi la sendon de desegnaĵoj perpoŝte kaj organizi Ago-Tagojn.

Por eventualaj helpoj turnu vin al:

- *GBADAMASSI Latifou, BP:302 Lokossa (Mono), Benin, Tel: +229 95 34 95 15, <latifougbadamassi@yahoo.fr>, UEA-konto: gbla-e*
- *Ronald GLOSSOP, Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo 8894 Berkay Avenue, Jennings MO 63136, Usono, +1(314) 869 2303, <rglossos@siue.edu>*

## Global Commons en Esperanto

Jen esperantigo (kun kelkaj aktualigoj) de la teksto nederlande kaj angle prezentita de Jan Willem van Leenhoff kaj Rob Moerbeek, kiel mondfederistoj-esperantistoj, kontribue al agado de la „All winn”-grupo (t.e. grupo por la profito de ĉiu kaj ĉio) de mondfederistoj kaj aliaj pacorganizoj, invitetaj de la Ĝenerala Sekretario de UN, Ban Ki-moon, kun-idei por savi la mondajn riĉaĵojn. La teksto estos kombine plusendita al UN, kiel sciigis la responsulo, s-ino Lisinka Ulatowska, mondfederisto de jardekoj aganta inter aliaj NRO-j ĉe UN.

**Niaj Komunaj Valoraĵoj** („Global Commons” en la ĵargono de UN)

Prezentante la libron „UN Ideas That Changed The World” (Ideoj de UN ŝanĝintaj la mondon), oni ofte citis la terminon „Komunaj valoraĵoj”.

Ni esprimas nian apogon al daŭripova utiligo de tiuj valoraĵoj, tamen tiel ke profitu la tuta homaro kune kun la naturo kaj estontaj generacioj.



Prioritatu disvastigi la konscion pri nia situacio: se jare ni foruzas po 1,5 terproduktarojn, ni evidente jam delonge konfliktas kun la homaj rajtoj, inkluzive de la infanaj, virinaj, indiĝenaj, kaj ĉies ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj rajtoj plus la Ĉarto de la Tero. Viktimiĝas ĝuste la malfortaj: la financa krizo trafas kiel unuajn la rifuĝintojn, handikapulojn kaj senrajtigitajn laboristojn. Fakte, samkiel en la Antikveco, la ekonomio grandparte flosas sur ekspluatado de sklavoj, precipe en la Tria Mondo. Eĉ la malproportciaj 0,7% de Malneta Nacia Produktaro por evoluhelpo estas kontestataj, pretekste de la taksataj 40% de financoj forlikantaj al kontoj de koruptaj aŭtoritatoj, dum indiĝenaj popoloj, el kies teritorio oni spilas la mineralojn, estas malavantaĝataj kaj kruele subpremataj.

Ekspluatado de fiŝejoj, mineraloj kaj aliaj komunaj posedaĵoj trudas multajn en militadon, ribeladon, piratadon aŭ eskapadon en drogojn, alkoholaĵojn (kiuj kaŭzas senresponsajn ekscesojn, sed ankaŭ tabako viktimitas pli da homoj ol oni konscias, ĉar velkintoj ne plu vidigas sin publike).

Savon povas alporti baza salajro por ĉiu, sed antaŭ ol tio estos pravigebla, necesas spirita edukado, instruado al memstara pensado kaj memsava kapablo, kombine kun la necesa solidaremo.

DEMOKRATIO tiam estos progresigebla ĉie, ankaŭ ene de UN mem. Se estiĝu monda komunumo de samrajtaj mondĉivitanoj, estu kunmetita monda estraro, elektita-kaj-kontrolata SOCIOKRATE, t.e. en homaro ŝtupe kundecida de la bazo ĝis la pinta instanco.

LIBERECO estas ĉefa homa bezono, sed la koncepto estu taŭge interpretata: ne kiel senbrida memismo/egoismo, sed en la senco de konscio pri la trakomprenata memintereso en solidareco. Distanciĝo efikas nur malproduktive.

Se antaŭe la MINACO de tria Mondmilito per atomarmiloj motivis tutmondan kunlaboron, nun ĝian urĝon anstataŭas la EKOLOGIA KATASTROFO, necesiganta kompletan renverson. Manko pri pura trinkakvo, senindulgaj konkurenco kaj konfliktoj pri la lastaj mineralaj rezervoj povas nur akriigi la kontraŭaĵojn. Venis la horo bilanci.

Riĉaj landoj havas sian ŝtatan ŝuldon, parte el la ekologia „piedmarko”, sed ofte ankaŭ el historio de kolonia ekspluatado kosteginta varojn kaj vivojn. Tio kunpezu ĉe redivido de la riĉaĵoj (aŭ ŝuldo-kontotenado ĝis la tempo maturiĝos).

Evidente tio postulas centran organon. Akcepteblo de tia aŭtoritato dependos de ĝia demokrateco. Se ĉiu povu samrajte kundecidi, necesas

internacia kontakto kun plejeble da samopiniantoj. Por tio estas bezonata neŭtrala lingvo. Esperanto estas rimedo elprovita, kun ankaŭ esenca propra valoro interproksimigi popolojn kaj kulturojn. Ĝis nun decida voĉo estis rezervita por regantoj de la malfacila angla, krom la rusa (antaŭe), kaj jam pliiĝas la influo de la ĉina. Ne eblas spekulii, ke homoj, super kies kapo oni decidas, sin sentu koncernataj kunlabori por gardi la komunajn valorojn.

### **Ideoj apoge al UN**

Anstataŭ al naciaj registaroj, la profunda maro, Antarktiko kaj aliaj komunaj apartenu al UN, ĉerpontaj fiksjaj enspezoj el ili por kapablo kaj salajrado de la necesa monda polico. Tio estas bezonata ankaŭ por kontroli fiŝadon, poluadon kaj minadon. Eblas ideoj krome pri produktado de nutraĵoj (manĝeblaj algoj), purigo de la maroj, revivigo de “mortaj” maroj, ekz. la du gigantaj flosantaj rubinsuloj, cele energiproduktadon sur ĉirkaŭmurantaj ŝiparoj (vrakojn eblas elfundigi kaj ripari) per sunĉelaroj aŭ parta tegmentado laŭ modernaj enurbaj tegmentoj kun hortikulturo aŭ sunpaneloj. Kaj eblas ĉerpado de utilaĵoj el la rubo. Laborfortoj abundas inter la senlaboruloj, senŝancaj rifuĝintoj kaj laborsopiraj prizonuloj (kiom socie nedanĝeraj).

Ni kore subtenas la iniciatojn de UN kiel Monda Tago de la Oceanoj, de la Paco<sup>3</sup>. Krome oni esploru, ĉu la dolĉa fandakvo i.a. de Gronlando estas kolektebla (kiel ŝipegoj provas elmarigi la BP-nafton en la Meksika Golfo): baldaŭ pura trinkakvo superos la valoron de nafto, kiel ĉefa vivbezonaĵo.

Poste oni zorgu malpolui la aeron: alternativa pulsado en aviado eniru la esplorprogramojn de sciencistoj/teknikistoj.

Krom la utiligo de akva, venta kaj suna energio, estu rekomendata ĉefe vegana dieto: fungoj, legomoj, frukto- kaj nuks-arboj ne poluas per CO<sub>2</sub>. Tio sola jam prezentas grandegan gajnon.

Gardado de homaj rajtoj postulas novaĵo-disponigon SENDEPENDAN: la gazetaro, radio-kaj-televidaj responsuloj disponu propran enspezadon liberan de trudoj el aferistoj, barantaj objektivan informadon.

UN havu punrajton ebligantan punpagigi, se necese. Sed ĉar perforto ĉiam propaĝiĝas kaj memkreskemas, intertraktado kaj persvado

---

<sup>3</sup> En la ILEI-rezolucio ni aldonis, ke ni planas enprogramigi ilin en Esperanto-instruadon.

antaŭu al eventuala – foje efektive necesa – armila interveno, kiu tamen restu tempe limigita. Ankaŭ tiam senpovigo implicu ne mortigon, sed provizoran senenergiigon. Malobservantoj estu juĝataj laŭ la homaj rajtoj en publika proceso kun justa defendo. Puno prefere konsistu en deviga task(ar)o. Sed ĉefas la protekto de la socio.

Fine ni gratulas pri „UN-Ideoj ŝanĝintaj la mondon”: ni kore rekomendas la verkon, ankaŭ por inter esperantistoj priparoligi la neplenumitaĵojn, esperante trovi en la vasta monda komunumo solvojn por gardi la komunajn valoraĵojn. Tiel ni preventas ke per uzo de unu nacia lingvo perdiĝus multe da talento.

*Jan Willem van LEENHOFF kaj Rob MOERBEEK*

## **„Vojaĝo en Esperanto-lando” = Vojaĝo hejmen**

recenzo de **Luiza CAROL** (Israelo)

La perfektiga kurso de Boris KOLKER estis unu el la plej valoraj travivaĵoj en mia vivo. Fakte, la libro "Vojaĝo en Esperanto-lando", sur kiu baziĝas la kurso, similas al turneo tra la Esperanta kulturo. Sed oni ne sentas sin alilanda turisto dum tiu turneo. En Esperanto-lando oni sentas sin hejme – jen grava eco de la Esperanta kulturo, kiun la aŭtoro de la kurso helpas al la lernantoj realigi. Mi opinias, ke tio okazas pro la fakto, ke la Esperanta kulturo estas ĉiunacieca. Laŭ mi, la kurso de Boris Kolker tre bone respegulas tiun ĉiunaciecon, kongruantan kun la sento de "hejmeco" kiun la lernantoj povas akiri pere de ĝi.

Kutime, la kursoj pri naciaj kulturoj enfokusigas la pasintecon, dum la kursoj pri sociaj movadoj enfokusigas la estontecon. La Esperanta kulturo, estante samtempe ĉiunacieca kaj movada speco de kulturo, prezentas apartajn rilatojn al la pasinteco kaj al la estonteco. Tial oni povus diri, ke ĝi estas siamaniere kaj nova kaj malnova kulturo. Tion la lernanto sentas tute nature, kiam li aŭ ŝi vojaĝas tra la kurso (aŭ nur tra la kursa libro) de Boris Kolker.

Tiu ĉi libro estas samtempe:

- konciza enciklopedio pri esperantismo
- konciza historio de la lingvo Esperanto kaj de la esperantista movado

- konciza historio de la Esperanta literaturo
- antologio de Esperanta poezio
- antologio de Esperanta prozo
- antologio de artikoloj pri turismo, sporto, sano, tekniko, scienco.
- manlibro de stilo
- ekzercaro pri lingvo kaj stilo, por progresantoj
- modelo de plano por organizi klubajn renkontiĝojn
- gvidlibro por nunaj aŭ estontaj aktivuloj en la movado (t.e. por organizantoj de esperantistaj kongresoj, kunvenoj, festivaloj, ekskursoj; por eldonistoj, redaktoroj, raportistoj de radioelsendoj aŭ televidelsendoj ktp.)
- kurso de beletra kreado (por nunaj aŭ estontaj verkistoj, kanto-kreantoj, reĝisoroj, aktoroj, ĵurnalistoj, raportistoj, prelegantoj ktp.)
- proverbaro
- kvizaro pri esperantistaj movado kaj kulturo
- albumo de belaj fotoj pri la esperantistaj movado kaj kulturo

Kiel la aŭtoro sukcesas transdoni al la lernantoj tiom multe el la esenco de la „verda mondo”? La libro artece sukcesas krei la etoson de imaga E-klubo, prezentante ĉiun lecionon kiel amikan renkontiĝon, en kiu oni legas, prelegas, ekzercas, babilas kaj... amuzas sin. La etoso de tiu imaga klubo estas fakte la etoso de la E-kulturo mem.

Unu el la meritoj de „Vojaĝo en Esperanto-lando” estas tio, ke ĝi restas „malfermita”: ĝi donas al la lernanto la senton, ke li aŭ ŝi partoprenas nur parton el la ĉiu-semajnaj renkontiĝoj de tiu imaga klubo. La lernanto estas kvazaŭ invitata nur kelkfoje en la klubon, kaj maltrafas la aliajn renkontiĝojn. Tiamaniere, la aŭtoro instigas nin fini la kurson kun la deziro kompletigi niajn konojn: legi la librojn kiujn li prezentis kaj ankaŭ tiujn kiujn li rekomendis sed ne prezentis, viziti aliajn lokojn, ekkoni aliajn klubojn ks.

Mi dankas al Boris Kolker, ke li akompanis min dum tiu ĉarma vojaĝo hejmen – ĉar dum la kurso mi vere komencis senti min hejme en Esperanto-lando. Ni ĉiuj estas „hejme” sur la planedo Tero, eĉ se ni ne lernas E-on, sed la Esperanta kulturo igas nin pli bone konscii la fakton, ke ni apartenas samtempe kaj al nia lando, kaj al nia planedo.

## Alvoko al instruistaj ges-anoj

de Johano PETIK (Hungario)

*Estimataj gekolegoj!*

Sur la paĝoj de IPR, en niaj konferencoj ni traktadas unuavice la demandojn pri kiel instrui pli efike ol ĝis nun Esperanton. Tio estas en ordo, ni estas ja unuavice instruistoj (aŭ instruantoj, instruontoj), IPR estas periodaĵo unuavice pedagogia.

Samtempe mi ne dubas pri tio, ke la dominado de metodikaj temoj en nia komunuma vivo ne signifas, ke aliaj demandoj, temoj ol ĉi tiaj ne agitus nian spiriton. Tiajn demandojn estigas jam ankaŭ la malsupereca, mizera stato, negranda ŝato de la E-instruado mem en rondoj pedagogaj kaj ankaŭ en la makrosocio, kiu sendube ofte elmetas al provado niajn persiston kaj eltenon en la instruado. Mi riskas nenion supozante, ke ĉi tiajn zorgojn granda parto de nia kolegaro nutras ne sole rilate al la sorto de la E-a instruado kaj ĝenerale de la lingvo mem, sed ankaŭ rilate al sia privataj kariero kaj vivo. La plej fortajn zorgojn kaj ĉagrenojn tiajn sendube sentas tiuj el niaj gekolegoj, kiuj akiris instruistan trejnitecon, rajtigantan ilin okupi normalan postenon pedagogan, sed kiujn la mizera stato de E-instruado ankoraŭ suferigas je senĉesa frustrigo.

Mi supozas, ke pri tiaj demandoj ni ne okupiĝas elirante el la opinio, ke la plibonigo de tiu stato ne strikte ŝuldiĝas al la primara profilo de ILEI kaj de E-instruistoj, sed prefere al la tuta esperantista komunumo kaj al la respondecaj instancoj makrosociaj. Vero en ĉi tiu opinio estas kaj mi tamen aŭ ĝuste surbaze de ĉi tio avertas, ke la nuraj atendado kaj paciĝo kun ĉi tiu situacio apenaŭ iom helpas al ni eliĝi el la mizera stato, precipe se ĉe la koncernaj faktoroj ne montriĝas signoj eĉ de la emo iom akceli la antaŭenigon de nia afero. Ni ne miru, se ordinaraj e-istoj reagis indiferece al ĉi tiaj zorgoj: la kontentigo de iliaj bezonoj postulas apenaŭ iom pli da kunlaborado ol kiu estis farita ĝis nun, ĉar la UK-oj kaj la ĝisnunaj ebloj utiligi sian E-scion pli malpli kontentigas ilin. Ĉar niaj propraj bezonoj estas pli vastaj kaj gravaj ol la iliaj, mi opinias, ke estas unuavice ni E-pedagogoj tiuj, kiuj devus ludi la rolon de movada fermentilo en E-ujo. Estas ni, kiuj devus konsciiĝi al la tuta E-movado, ke ties ĝisnuna agado por influi la makrosocion favore al E-o antaŭ ties fono el grandega nekomprene kaj indifereco estas ne sufiĉe taŭga por atingi sufiĉan antaŭeniĝon. Ni devus persvadi ĝin liberigi sin de la efiko de certaj

religieskaj narkotiloj, ekzemplataj de tiaj proverboj tradiciaj, kiel „senĉesa guto traboras eĉ ŝtonon” k.s. rimarkigante, ke en nia universala movado ekzistas multe pli da ebloj ol kiom ni ĝis nun utiligis.

Mi koncedas, ke tiuj ebloj momente estas nur potencialaj, kondiĉataj de atingo de certa, pli alta nivelo en la evoluo de la movado. Je tiu nivelo la movado, resp. ties organoj, funkcias kvazaŭ kiel interdependaj organoj de viva organismo. Tio niakaze signifas, ke samtiel, kiel la bona funkciado de la digesta kanalo en sana organismo viva prezentas la kondiĉon de bona funkciado de la ceteraj organoj, tiel ankaŭ ni povos tiam plej multe fari (niaterene) por nia komuna afero, se la cetero de la movado liveras laŭeble plej multe da „materialo” (lernontoj) al kiu instrui la lingvon. Ne estas hazarde, ke la plenumon de la „digesta kanalo” mi pretendas de la ceteraj „organoj” de nia „organismo” (ne ekskludante nin mem el ĝi!): la problemoj de varbado ankaŭ de novaj disĉiploj rilatas al terenoj multe pli ekster niaj subjektivaj (kvantaj) kaj objektivaj ebloj, ol tiuj kiujn ni mem povus solvi. Sendube oni povas antaŭvidi, ke al similaj instigoj la UEA-gvidantaro reagos argumentante, ke la agado de UEA kaj de landaj asocioj celis (almenaŭ objekte) ankaŭ la liveron de plej eble pli da lernontoj de E-o. Ili kelkgrade pravos. Ni tamen devus insisti petadi, ne nur pro nia ĉi-supre traktita interesiteco, sed ankaŭ ĉar la strategiaj konceptoj de UEA kaj ĝiaj „filioj” bezonas signifan plibonigon. Unu el tiaj konceptoj plibonigaj prezentis ankaŭ mi, ĝi legeblas en artikolo aperinta en la aprila n-ro lastjara de la revuo „Esperanto”. Al la baza ideo tie skizita ŝajne reagis neniu el nia kolegaro, kvankam ĝi implicite kaj unuavice celis la antaŭenigon ankaŭ de la supre menciita problemaro.

Mi esperas, ke la supra legaĵo restos jam ne senreaga.

## **Raporto pri la seminario de ILEI-Ĉinio en Taiyuan<sup>4</sup>**

de GONG Xiaofeng (‘Arko’) (Ĉinio)

De la 1-a ĝis la 11-a de aŭgusto 2010, okazis seminario de ILEI-Ĉinio kun la temo „Pasinteco, estanteco kaj estonteco de E-instruado en Ĉinio” en elementa lernejo BaiyangshuJie (BYSJ), urbo Taiyuan, provinco Shanxi. La seminarion partoprenis 59 esperantistoj el Ĉinio (inkluzive de

---

<sup>4</sup> Pro manko de spaco, en IPR 2010/3 aperis nur mallonga informo pri la seminario, sed ni promesis al la legantoj pli ampleksan raporton. Jen ĝi. – NdIR

dek E-studentoj el Scienca kaj Teknika Universitato de Interna Mongolio kun la seminaria gvidanto, LIU Baoguo, plus 5 studentoj el aliaj universitatoj), Koreio, Danio, Japanio kaj Usono.

La 1-an de aŭgusto la partoprenantoj kolektiĝis en interkona vespero en Taiyuan kaj ĝuis artajn prezentojn de lokaj lernantoj, kaj novaj kaj malnovaj amikoj kun granda ĝojo renkontiĝis kaj varme interbabilis.

La 2-an de aŭgusto inaŭguriĝis la seminario. Dum la inaŭguro GONG Xiaofeng, sekciestro de ILEI-Ĉinio, kaj esperantistoj el aliaj landoj pri E-instruado salutis la ĉeestantojn. WEI Yubin, estro de la BYSJ lernejo, konigis al la ĉeestantoj la E-instruadon de la lernejo kaj E-movadon de la provinco Shanxi, kaj YU Jianchao, laboranto de la E-sekcio de Ĉina Radio Internacia (ĈRI), retrorigardis la historion pri la profesiaj E-laborantoj en Ĉinio. Peter WEIDE faris prelegon pri Germana edukado, S-ro WANG Tianyi komparis Esperanton kun la ĉina lingvo. La inaŭguron prezidis LIU Baoguo.

Vespere de la 2-a de aŭgusto estis amuza vespero, preskaŭ ĉiu partoprenanto estis invitata al la interesaj programeroj, dank' al la laboro de nia teamo de distraj programeroj.





La 3-an de aŭgusto la esperantistoj, kiuj ne ĉeestis la seminarion de la ĉina sekcio de ILEI en Taiyuan, povis aŭskulti prelegojn en sia hejmo dank' al interreto.

Ĉinaj esperantistoj ofte uzas la retan mesaĝilon YY kaj amasiĝis en la virtuala "E-ĉambro" por reta instruado kaj lernado. Tiutage 4 prelegoj estis faritaj de S-ro LI Shijun (Laŭlum), Ricko, Ombro kaj Jano laŭvice, 12 retanoj aŭskultis la prelegojn en la ĉambro.

La temo de Laŭlum estis „La plej bona metodo por instruado de Esperanto.” Japana esperantistino Ricko konigis al la ĉeestantoj la lernejon Ikedakita-supermezlernejo de la gubernio Oosaka, kie ŝi laboras kaj instruas Esperanton. Ŝi menciis 8 manierojn kiujn ŝi uzas dum sia instruado: 1) kanto, 2) ludo, 3) interreta kurso, 4) intervjuo al alilandaj gastoj, 5) interŝanĝo de kartoĵoj, 6) interreta korespondado, 7) video-lernilo "Mazi en Gondolando", 8) simpla teksto kaj riĉaj desegnaĵoj.

JANG Jeong-Ryeol (Ombro) raportis pri Korea E-movado. Jano parolis pri sia lernado de Esperanto kaj la ĉina lingvo.

La 4-an de aŭgusto okazis fakkunsido. GONG Xiaofeng, estrino de la ĉina sekcio de ILEI, faris laborraporton de ĉina sekcio, kaj anoncis, ke de la 8a ĝis la 15a de aŭgusto 2011 en Tianjin okazos la venonta seminario kaj ke samtempe okazos la 1-a komuna seminario de la ĉina, japana kaj korea sekcioj de ILEI. La kunsido ankaŭ elektis LIU Baoguo vicestro kaj kumulanta sekretario de ĉina sekcio, ZOU Jin kasisto, kaj CUI Jiayou kaj XIONG Hui redaktoroj de la planata revuo. La ĉina sekcio planas, ke la sekcio starigos retpaĝaron kaj revuon, kaj kreskigos sian membronombron estontece.

Antaŭ la fakkunsido HAN Zuwu, prezidanto de Tianjin-a E-Asocio, koncize konigis al la ĉeestantoj la urbon Tianjin kaj Tianjin-an E-Asocion. LUAN Huiqin, vicprezidanto de la Tianjin-a E-Asocio kaj prezidento de LKK por la venonta seminario en Tianjin, prezentis al la ĉeestantoj la Tianjin-an Fremdlingvan Universitaton.

ISIKAWA Tieko, sekciestrino de ILEI-Japanio, faris prelegon kun la temo „E-instruado en japanaj universitatoj”, S-ro LIU Baoguo raportis pri la instruado kaj lernado de E-o en Interna Mongolia Scienca kaj Teknika Kolegio kaj Baotou-mezlernejo.

Vespere, S-ro WEN Jingen el Beijing prelegis, kaj S-rino SONG Ping raportis pri sia E-laboro en Heilongjian Scienca kaj Teknika Instituto en Harbin.

La 5-an de aŭgusto okazis du demonstraj kursoj kaj prelego de Prof. Ron GLOSSOP. Unue, S-ro Laŭlum demonstris kaj poste Ricko demonstris kurson por intervjuo al la gastoj, ŝi invitis aliajn 5 eksterlandajn instruistojn kiel gastojn kaj 10 studentoj salutis kaj demandis demandojn laŭvice. La demandoj, kiujn Ricko preparis, estis ege interesaj, tipaj kaj utilaj frazoj kaj ni multe ĝuis. Posttagmeze la ĉeestantoj ekskursis al la Bieno de Chang-familio, kie troviĝas tradiciaj konstruaĵoj.

La prelego de Ron emfazis 3 punktojn: 1) la nuna ŝanĝo de internaciismo al tutmondismo; 2) komunikado, identeco kaj solidareco; 3) la rilato inter la buŝa lingvo kaj la skriba lingvo.

La 7-an de aŭgusto publikajn prelegojn en la seminario aŭskultis ĉirkaŭ cent homoj, inkluzive de la gepatroj de E-lernantoj en la elementa lernejo Baiyangshujie, Taiyuan, por ke la publiko pli bone konu la situacion de Esperanto.

Ron prelegis laŭ la temo „Esperanto kaj Mondcivitaneco.” LIU Baoguo interpretis por la ne-esperantistoj. Poste Petro, Tiekaj kaj Ricko, Jano kaj Ombro reciproke parolis pri la situacio de la instruado de la angla lingvo en siaj landoj. La ĉina esperantisto Laŭlum prelegis pri la temo „Lingva problemo en Informa Tempo.”

De la 1-a de aŭgusto ĝis la 5-a, antaŭtagmeze estis prelegoj, demonstraj kursoj, kaj posttagmeze estis kursoj por seminarianoj. Ekde la 6-a ĝis la 10-a tage estis diversaj kursoj por komencintoj, progresantoj, gestudentoj kaj infanoj el la BYSJ-lernejo. Parto el la seminarianoj foriris post la prelegoj pro manko de tempo, sed 26 kursanoj restis en la seminario. La instruistoj estis instruemaj kaj spertaj; la kursanoj estis lernemaj. Multe da E-metodoj kaj manieroj estis uzataj dum la kursoj. La alilandaj instruistoj estis ege ŝatataj de kursanoj kaj infanoj.

Ekde la jaro 2008, en la BYSJ-lernejo funkcias E-kurso kiel deviga programo por la infanoj de la unua klaso ĝis la sesa klaso; ĉiusemajne estas 2 lernohoroj por infanoj. En la lernejo estas aparta E-klasĉambro kaj du E-instruistinoj. Dum la seminario okazis du kursoj. Unu okazis antaŭtagmeze por unua-gradaj infanoj, kiuj lernas Esperanton dum unu jaro. La alia estis posttagmeza kurso, kiun vizitis pli aĝaj infanoj, kiuj jam lernas Esperanton dum pli ol 2 jaroj. Prof. Ron gvidis antaŭtagmezan kurson; aliaj alilandaj instruistoj gvidis la posttagmezan kurson, por ke la infanoj spertu kontakton kun pli da alilandanoj.

Vespere de la 8-a kaj la 9-a, kursanoj kaj instruistoj venis al la kunveno por praktiki E-on per skajpo, Aŭgusto Casquero el Hispanio kaj

Mirejo el Svislando varme interbabilis kun kursanoj. Estis bonega E-etoso en la kunvenejo.

La 11-an de aŭgusto, fermiĝis la seminario de la ĉina sekcio de ILEI, GONG Xiaofeng, sekciestro de ILEI-Ĉinio, faris resuman raporton. Nome de ILEI-Ĉinio, ŝi dankis al ĉiuj, speciale al ILEI pro la financa subteno. Ŝi ankaŭ esprimis dankegon al la estraro de la BYSJ-lernejo, sen ilia helpo, ĉio ne povus iri glate. S-ro WEI Yubin, la estro de LKK, faris paroladon. Ankaŭ alilandaj instruistoj parolis sinsekve, ili alte taksis la seminarion kaj havis neforgeseblajn tagojn kune kun ni en Taiyuan. Du el la kursanoj parolis kiel reprezentantoj, ili esprimis siajn dankemojn al ILEI-Ĉinio, kiu prezentis bonan okazon por ilia lernado kaj praktikado de E-o.

S-ro Ombro donacis 5 ekzemplerojn de la ĵus aperinta romano, tradukita de S-ro LI Shijun (Laŭlum) al nia sekcio. La ĉina sekcio decidis doni ilin al jenaj organizoj kaj personoj pro iliaj eminentaj laboroj:

- 1) Al la BYSJ-lernejo, por danki ilian laboron en la instruado al infanoj;
- 2) Al Tianjin E-Asocio, gastigonto de la venonta seminario en 2011;
- 3) Al Baotou-Studenta E-Asocio, Interna Mongolio;
- 4) Al s-ro LIU Baoguo pro lia eminenta instruado;
- 5) Al s-ro CHEN Zaiwei, kiu instruas E-on enrete dum la lastaj jaroj, kaj sukcese organizis la vintran trejnadon gviditan de s-ro Dennis KEEFE en la Hainan-Insulo ĉi-jare.

Sendis al ni gratul-leterojn Stefan MacGill, prezidanto de ILEI, kaj Mirejo GROSJEAN, prezidanto de Internacia Ekzamena Komisiono kaj Svisa ILEI-sekcio, LEE Jung-Kee, sekciestro de ILEI-Koreio; ankaŭ aliaj asocioj en- kaj eksterlandaj gratulis pro la okazigo de la seminario.

**Eventoj...**

## **Kvar klasoj – kvar landoj**

En urbeto de centra Hungario kolektiĝis meze de oktobro trideko da lernantoj 10-14-jaraj kune kun siaj instruistoj kaj pliaj gvidantoj. La aranĝo okazis kadre de dujara projekto laŭ la Eŭropa interŝanĝ-programo Comenius. La projekto atingis sian trikvaronan punkton: la unua renkontiĝo

okazis en Polski Trambesh (Bulgario)<sup>5</sup>, la dua printempe ĉi-jare en Liono, la tria nun en Tiszafüred, Hungario, kun la lasta renkontiĝo en Rybnik, Pollando printempe de 2011. La junuloj pretigis koncerton, vizitis vidindaĵojn en la regiono, kune kantis kaj desegnis, kaj ĝenerale refortigis la rilatojn, kiuj jam stariĝis inter la grupanoj.



*Vizito en la loka fajrobrigadejo*

La vojaĝaj kaj pliaj kostoj de tiuj vizitoj estas kovritaj el la projekta buĝeto. Indas pro tio ekkoni pli vaste la eblojn kaj devojn por proponi kaj realigi tiajn Eŭrope subtenatajn projektojn. Tial ILEI organizis meze de oktobro en Germanio la unuan seminarion pri subvencipetado (SPSP).

Partoprenis la lastan tagon de la renkontiĝo en Tiszafüred la prezidanto de ILEI, kiu alportis konkretan subtenon por la projekto, en la formo de ekzempleroj de la revuo *Juna amiko*, kiu dediĉis plurajn paĝojn al raporto pri la antaŭa renkontiĝo en Francio, kaj kiu certe raportos simile pri

---

<sup>5</sup> Vd. IPR 2010/1 p.36-39. – NdIR

la nuna aranĝo – ĉar la instruistino de la nuna gastiga grupo fariĝas redaktoro de tiu revuo.

Praktika rezulto de la ILEI-vizito estas antaŭenirigo de la planoj nomi reprezentanton de ILEI en Bulgario, kiu estas la unua paŝo survoje al la starigo de Landa Sekcio. ILEI jam havas sekciojn en la ceteraj tri projekt-landoj.

*Smg*

## **TORPEDO-6**

*Pedagogiaj Tagoj en Herzberg am Harz, Germanio (8-12.10.2010)*

La 5-taga internacia renkontiĝo ofertis al la interesiĝantoj pri E-instruado multajn fakprelegojn, lingvan kaj metodikan perfektigon, eblon por spertiĝi pri instruado, diskuti pri faktemoj kaj interŝanĝi spertojn. Ĝi estis organizita de Asocio de Germanaj E-Instruistoj (AGEI), Interkultura Centro Herzberg (ICH)/Germana E-Centro kaj ILEI. La jam tradicie altnivela kunveno allogis 23 partoprenantojn el 8 landoj.

La ĉeftemo kongruis kun la lastjaraj sukcesaj agadoj de ICH: internacia kunlaboro, EU-projektoj kaj subvencipetado. Por trakti tiun gravan temon Torpedo-6 estis organizita kune kun ILEI, eĉ kombinite kun kunsido de ILEI-estranaroj kaj danke al financa subteno de UEA al ILEI.

*Fakprelegoj, programo:*

Stefan MACGILL: „Verve pri verboj”; Radojica PETROVIĆ: „Interkulturaj lingvaj ludoj”; Zlatko TIŠLJAR: „Zagreba instrumentado”; Zsófia KÓRÓDY kaj Ida HAVASI: „KER-ekzamenoj en Hungario kaj internacie”; Peter ZILVAR: „Andragogio, trejnsesioj por instrukapabligo, bibliotekoj, arkivoj”; Kimie MARKARIAN: „Sorobaneca mensa kalkulado helpe al lingvolernado”; Paola B. GIOMMONI: „Itala kulturo”.

La estraranoj de ILEI prezentis sin kaj rakontis pri la Ligo, pri gravaj eventoj, konferencoj ktp. La ĉeftemon de la ILEI-seminario enkondukis Zsófia Kóródy, kiu raportis pri ICH-agadoj kaj per resuma trarigardo provis iom orienti ĉiujn en la ĝangalo de EU-projektoj.

Inter la invititaj fakprelegintoj estis Zlatko Tišljár, estrarano de EEU. Li prezentis ekzemplojn, projekttemojn, prelegis pri organizado kaj projektverkado, financado fare de Comenius- kaj Grundtvig programoj de EU. Li aktivigis la partoprenantojn kaj kun Zsófia donis multe da praktika helpo, por ke ili ellaboru konkretan projektplanon enkadre de la Programo

Dumviva Lernado: Comenius (por lernejoj), Erasmus (por universitatoj) aŭ Grundtvig (por plenkreskuloj).

Bona rezulto de tiuj kelkaj tagoj estas planoj por universitata kunagado, serĉado de Comenius-subvencio por mezlernejoj kaj strebado, ke ILEI ekhavu praktikan gvidilon kaj helpilon por projektverkado.

Tiu ĉi seminario estis inter la studmoduloj, kiujn ICH, kunlaboranta partnero de ILEI ofertas al interesiĝantoj pri instrufakaj temoj, studemuloj, nunaj kaj estontaj instruantoj, instruistoj.

Bonvenon ankaŭ al la metodikaj, instrukapabligaj sesioj en 2011. Pri la klerigmoduloj, studsesioj vi trovas priskribon, detalojn ankaŭ ĉe la paĝaro de AGEI (germana sekcio de ILEI): <http://agei.esperanto-urbo.de> kaj ĉe <http://ic-herzberg.de/esperanto/index.html>

*Zsófia KÓRÓDY*  
*prezidanto de AGEI, estrarano de ILEI*

## ILEI-labortable

**Depost la konferenco, okazis interalie la sekvo:**

- Sukcesis eventoj en Bubanza, Burundo, Taiyuan, Ĉinio kaj kursolanĉoj en Meksiko.
- Okazis teknika kunsido de tri estraranoj en Herzberg meze de oktobro, kadre de la unua seminario de ILEI pri subvenci-petado (SPSP)<sup>6</sup>.
- La uzo de la Koleghelpa Kaso signife kreskis (18 en 2009 kaj 45 en 2010) ĉefe pro la intensigata agado tra Latinameriko, sekve de la ĉi-jara konferenco.
- Ni ĝojas konstati kreskon en la membro-nombro de pli ol 10%.
- Konferenco 2011 kaj la ligita Simpozio estas anoncitaj, kune kun reta aliĝilo.
- La simpozia kajero de Krakovo (2009) estas eldonita en elektronika formo.
- La transformita <*edukado.net*> estas bonvenigita, kun alvoko de ILEI al la sekcioj kaj ĉiu ajn registri tie ĉiujn Esperanto-kursojn.
- La instruisto-trejna kurso sukcese lanĉiĝis en Poznano, subtenata de ILEI kaj UEA per kvar stipendioj.



---

<sup>6</sup> Vd la raporton de Radojica Petrović sur la sekva paĝo – NdIR

- Kurso de ILEI estas planata por majo 2011 en la kastelo Grésillon (nova partnero de ILEI – aliaj novaj partneroj estas AIS, EEU, ISAE kaj LIBE).
- Lanĉita la projekto ‘Esperanto125’ lige kun la 125-jara jubileo de Esperanto kiu okazos la 26-an de julio 2012.
- Afiŝado de protokoloj de estraran-kunsidoj en Hago (jan.) kaj Antverpeno (maje); sekvos tuj tiu de Herzberg (okt.) kies raporton legu sube.
- Afiŝado en la retejo de financaj rezultoj kaj revizora deklaro pri 2009.
- Afiŝado de petilo por nomumo de reprezentantoj, prepare al kampanjo akiri novajn, precipe en latin-ameriko.
- Ĝisdatigo de la petilo por aliĝo de landa sekcio.
- Buĝeto 2011 estas pretigita, kun sumo por honorariato, konkreta firmigo de rilatoj kun ŝlosilaj partneroj kaj reorganizo de la kostoj de estrarkunsidoj.
- Lerneja komisiono reaktivigata, kun renovigita konsisto kaj pretigo de laborplano.
- ILEI reprezentiĝis novembre en KAEST (ĉiujara scienca aranĝo).
- Komencaj paŝoj faritaj por pretigi modernan multlingvan retejon por ILEI, paralele kun nia nuna interna Esperant-lingva retejo.

*smg, 12 novembro 2010*

## **Oktobra estrarkunsido de ILEI**

Ekde la 10-a ĝis la 12-a de oktobro 2010 kunsidis en Herzberg la prezidanto Stefan MacGill kun du ceteraj estraranoj, Zsófia Kóródy kaj Radojica Petrović. Ĉiuj tri ankaŭ prelegis en TORPEDO-6 kaj la ILEI-seminario pri subvencipetado.

Kvankam senkvorume, la tri estraranoj detale traktis brulantajn temojn el la ILEI-vivo. Iliaj konkludoj kaj proponoj estos prezentitaj al la ceteraj estraranoj por plutrakto kaj aprobo. Nova kunsido estas planata por marto aŭ aprilo 2011, por kiu nepros certigi kvorumon.

Estis traktataj temoj pri membraro, sekcioj, komitato kaj komisionoj, financo, konferencoj kaj novaj projektideoj kaj edukiniciatoj. Pli detalaj informoj jam aperis en la retejo de ILEI: <http://ilei.info/novajxoj/Herzberg2010okt.php>.

Resume kaj plej grave:

- La membronombro en 2010 kreskis, sed ankoraŭ necesas pli fidine konfirmi la membrarliston kaj statistikon. Estas planata varbkampanjo kiu estos turnita enen kaj eksteren de ILEI.
- Krom dudeko da bone funkciantaj sekcioj, ni havas kelkajn praktike ne funkciantajn (Irano, Rusio, kun neklara situacio en Britio), aliĝpetojn aŭ aliĝintencojn el kvin aliaj landoj kaj ŝancojn nomumi reprezentantojn el serio da aliaj landoj.



- La lerneja komisiono daŭre viglas post la sukcesa dumkonferenca kunsido pri lerneja agado en Matanzas.
- La buĝetpropono por 2011, krom la ceteraj ĉiujaraĵoj, antaŭvidas sumon por volontula laboro kaj financon subtenon al la *Interkultura Centro Herzberg*, rete bazita instruista trejnkurso de *edukado.net* kaj *Interlingvistikaj studoj* en Poznań.
- Post la programe kaj finance sukcesa Konferenco 2009 kaj programe sukcesa konferenco 2010 kun ankoraŭ ne konata financa rezulto, ampleksaj preparoj estas faritaj por la konferenco kaj simpozio 2011 kaj la aliĝado startigita.
- La ĉina sekcio de ILEI sendis allogan oferton por la konferenco 2012.
- ILEI iniciatis kaj pli konkrete lanĉos E-instruan projekton *Esperanto125* okaze de la 125-jariĝo de la Unua Libro.

*Protokolis kaj raportas: Radojica PETROVIĆ'*

**Juna amiko** aperos en 2011, je sama prezo, sama amplekso kaj sama ofteco kiel en 2010 – do tri 52-paĝaj numeroj, kun jarabono €14 en A-landoj kaj €9 en B-landoj (resp. po €11 kaj €7 kaze de mendo de 3 aŭ pli da ekzempleroj al unu adreso). Parte renovigita estas la redakcio, kaj kun nova administranto. Perantoj en 30 landoj aŭ nia kasisto akceptas viajn abonojn.

## La 44-a Konferenco de ILEI, Kopenhago, 17-23 julio 2011

*Lingva politiko kaj lingvaj rajtoj en edukado kaj scienca komunikado*

La unuaj konferencanoj jam sendis siajn retaliĝilojn. Vi povas fari same pere de <http://ilei.info/konferenco/alighilo2011.php>, aŭ uzi la paperan aliĝilon el ĉi tiu IPR. Jen la bazaj informoj por viaj aliĝo kaj mendoj.

### Konferencejo

La konferenco okazos en moderne ekipita teretaĝa bloko de prelegejoj en la Humanistika Fakultato de Universitato de Kopenhago. Ĝi situas je promendistanco de la kulturhistorie kaj turisme fama urboparto Christianshaven kaj estas atingebla unuvelure per metroo de la flughaveno kaj de la ĉefstacidomo. Ĉiuj programeroj krom la bankedo kaj eksursoj okazos tie. En la sama konstruaĵo konferencanoj havos je dispono studentan restoracion por tagmanĝi favorepreze kaj bonkvalite, kaj

bufedon por dumpaŭzaj trinkaĵoj. Pliajn informojn pri la konferencurbo vi trovos en la retejo de UK: [www.96uk-kopenhago.dk/knap-Kongresa-Urbo.html](http://www.96uk-kopenhago.dk/knap-Kongresa-Urbo.html).

## Programskemo

La akcepto kaj loĝigo okazos dimanĉon posttagmeze, la 17-an de julio, kun la tradicia interkona vespermanĝo en la konferencejo. Solena malfermo okazos lundon antaŭtagmeze. La kleriga programo, laborkunsidoj kaj diskutgrupoj okupos lundon, mardon kaj ĵaŭdan antaŭtagmezon. Ĵaŭdon posttagmeze okazos la lingva festivalo, kaj vespere la bankedo. Vendredon okupos la simpozio, kiu daŭros sabaton antaŭtagmeze ĝis solena fermo de la konferenco. La vesperojn plenigos kultura kaj distra programo. La varia ekskursa programo, kun du tuttagaj (TT) kaj kvar duontagaj (DT) ekskursoj, estas planata ĉefe por merkredo kaj parte por vendredo – por tiuj, kiuj ne interesiĝos pri la simpozio. Tiel ni minimumigas koincidon de la turisma kun la cetera programo lasante tamen elekteblon por diversaj gustoj kaj preferoj.

## Kotizoj

| Limdato                                         | 31 mar 2011 | 30 jun 2011 | poste       |
|-------------------------------------------------|-------------|-------------|-------------|
| Kategorio                                       | A / B       | A / B       | A / B       |
| Membro de ILEI <sup>1</sup>                     | 50 € / 30 € | 60 € / 36 € | 70 € / 42 € |
| Ne membro de ILEI                               | 63 € / 38 € | 75 € / 44 € | 88 € / 53 € |
| Junulo <sup>2</sup> aŭ handikapulo <sup>3</sup> | 25 € / 15 € | 30 € / 18 € | 35 € / 21 € |

<sup>1</sup> Membro estos konsiderata tiu, kiu pagos membrokotizon por la jaro 2011

<sup>2</sup> Junulo estas konsiderata tiu, kiu naskiĝis post la 31-a de decembro 1978.

<sup>3</sup> Bonvolu klarigi aŭ aldoni atestilon.

A. Ĉiuj landoj escepte de tiuj ĉi-sekve sub B.

B. Ekssocialismaj landoj de centra kaj orienta Eŭropo; ĉiuj landoj de Afriko, Latinameriko kaj Azio krom Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko.

Aliĝkotizo por parta partopreno estas 25 € tage por ĉiuj kategorioj.

***Speciala rabato por fruaj aliĝintoj:*** Aliĝintoj en la aliĝkategorio "Membro de ILEI (1)", kiuj aliĝos kaj pagos **ĝis 31 dec 2011**, ĝuos rabaton de 5 EUR, respektive pagos 45 EUR (A-landanoj), aŭ 25 (B-landanoj).

## Kotizoj

Vi povas helpi ILEI-agadon kaj nepagipovajn membrojn per mondonacoj al unu aŭ pluraj kaso kaj fondusoj de ILEI:

- "Dazzini" por subteni ne-pagipovajn konferencanojn
- Koleghelpa kaso por membrigi ne-pagipovajn kolegojn
- "Flugiloj": trejnado de junaj instruemuloj

- "Interkulturo": utiligado de Esperanto por interkultura edukado
- "Szerdahelyi": eldonado, instruista trejnado, esplorado pri didaktiko
- Afrika agado: okazigo de trejnseminarioj, edukaj aranĝoj kaj evoluigo de rilatoj kun afrikaj lernejoj kaj universitatoj

## Loĝado

Ni proponas loĝadon kun matenmanĝo en la hotelo Cabinn kaj en la studenta domo Handvarker-Skolehjemmet. La prezoj estas donitaj por unu persono / unu nokto.

**Hotelo CABINN METRO**, Arne Jakobsens Allé 2, 2300 Copenhagen,

| Ĉambro               | Prezo | Ĉambro                | Prezo |
|----------------------|-------|-----------------------|-------|
| Economy Room 4-lita  | 39 €  | Standard Room 1-lita  | 85 €  |
| Economy Room 3-lita  | 48 €  | Commodore Room 2-lita | 69 €  |
| Economy Room 2-lita  | 54 €  | Commodore Room 1-lita | 98 €  |
| Economy Room 1-lita  | 78 €  | Captain Room 2-lita   | 75 €  |
| Standard Room 2-lita | 58 €  | Captain Room 1-lita   | 112 € |

**Rimarko:** Ni akceptos mendojn por 3-litaj kaj 4-litaj ĉambroj nur se, respektive, 3 aŭ 4 aliĝantoj samtempe mendas kaj pagos tian ĉambron kaj konsentos loĝi kune en ĝi

**Studenta domo Handvaerker-Skolehjemmet**, Danshojvej 1-3, 2500 Valby

|                       |      |               |      |
|-----------------------|------|---------------|------|
| Loko en 2-lita ĉambro | 35 € | 1-lita ĉambro | 53 € |
|-----------------------|------|---------------|------|

**Rimarko:** Ni akceptos mendojn por loĝado en la studenta domo nur por frualiĝintoj, ĝis la 25a de decembro 2010. Post tiu dato ni devos sendi al la domo liston de loĝontaj konferencanoj kaj ne povos garantii akcepton de novaj mendoj por la studenta domo ekster tiu listo.

## Manĝado

Matenmanĝo estas inkluzivita en la loĝprezo. Dumtage, favorkosta manĝado eblos en la studenta restoracio kun varia oferto, apud la konferencejo. Por la tempo inter la posttagmeza kaj vespera programoj, ni rekomendas gustumi la etoson kaj manĝaĵojn en promenproksimaj restoracioj de Christianshaven.

**Bankedo: ĵaŭdo, 21 julio 2011, 19:00 - 23:00.**

**Restoracio Ravelinen**, Torvegade 79 · 1400 Kobenhavn K, apud pitoreska lago en Christianshaven - fama urboparto kun bohemia reputacio, ekestinta komence de la 17-a jarcento enkadre de plivastigo kaj modernigo de la fortikaĵo entreprenita de Christian IV, promendistance de la konferencejo.

**Menuo:** komenca trinkaĵo (papaja-limeda koktelo), bufedo kun deko da diversaj pladoj, inkluzive de vegetaraj.

Prezo: A-landoj: 55 EUR, B-landoj: 45 EUR.

## **Ekskursoj**

### **TT1, merkredo, 09.30 – 16.30: Norda Selando (80 EUR).**

Estos vizititaj Kronborg (la kastelo de Ŝekspira Hamleto), Louisiana (Muzeo de Moderna Arto) kaj Kastelo Frederiksborg kun la Nacia Historia Muzeo, inkluzive de eniro en la muzeon Louisiana kun lunĉo en la Boatdomo, veturo preter la Kastelo Fredensborg (la somera rezidejo de la danaj reĝino kaj kronprinco), eniro en Frederiksborg kaj profesia ĉiĉerono kun E-interpretanto.

### **TT2, vendredo, 09.30 – 16.30: Vikingaj tempoj kaj Roskilde (80 EUR).**

Roskilde estas la ĉefa eklezia urbo de Danio. La vojo al Roskilde trapasas la regionon kie homoj de la bronza kaj fera epokoj vivis antaŭ ĉirkaŭ 4000 jaroj, kaj poste vikingoj antaŭ 1000 jaroj. La ekskurso inkluzivas enirojn en la Katedralon de Roskilde el la 12-a jarcento kun ora altaro kaj 38 tomboj de danaj reĝoj kaj reĝinoj kaj en la Vikingan Muzeon kun kvin vikingaj ŝipoj el la 11-a jarcento, kaj krosadon tra la Fjordo de Roskilde kun lunĉo sur la ŝipo Sagafjord, ĉio kun profesia ĉiĉerono kaj E-interpretanto.

### **DT1, merkredo, 09.00 – 12.00: Buse tra Kopenhago (38 EUR)**

Busa rondvojaĝo ebligas konatiĝon kun diversaj trajtoj de la ĉefurbo de la plej aĝa reĝlando de la mondo. Inkluzivitaj estas Palacoj *Amalienborg* (oficiala vintra rezidejo de la reĝino) kun vizito al la Palaco de Christian VIII, en kies teretaĝo troviĝas apartamentoj kun originala meblaro el la tempo de la dinastio Glücksborg ekde 1983. Sekvos vizito al la Kastelo *Rosenborg* el la komenco de la 17-a jarcento por admiri ekspoziciojn de reĝaj kronrekvizitoj kaj de la murtapiŝoj de *Rosenborg*, teksitaj speciale por la bankeda salono fine de la 17-a jarcento.

### **DT2, merkredo, 13.00-14.00: Ŝipe tra la kanaloj (16 EUR)**

La kovritaj kanalaj boatoj veturigas tra la haveno kaj la idiliaj kanaloj de Kopenhago por vidi la Parlamenton, la rezidejon de la Reĝino, la specifan arkitekturon de la nova Reĝa biblioteko "Nigra Diamanto", la novan Operaon, preterpasi la Marvirineton kaj aŭskulti klarigojn de profesia ĉiĉerono kun E-tradukanto pri la historio de interesaj malnovaj kaj modernaj konstruaĵoj.

### **DT3-M, merkredo, posttagmeze: Promene tra Kopenhago (5 EUR)**

### **DT3-V, vendredo, posttagmeze: Promene tra Kopenhago (5 EUR)**

Danaj esperantistoj promenigos vin en malgrandaj grupoj tra la historia urbocentro kaj konatigos vin kun ĝiaj historio kaj vidindaĵoj. (daŭrigo sur p.41)

# A l i ĝ i l o

## La 44-a Konferenco de ILEI Kopenhago, 17-23 julio 2011

*Lingva politiko kaj lingvaj rajtoj en  
edukado kaj scienca komunikado*



- Persona nomo \_\_\_\_\_  
Familia nomo \_\_\_\_\_ ☐ Ino ☐ Viro
- Datoj (jjjj-mm-tt) de: alveno \_\_\_\_\_ foriro \_\_\_\_\_
- Lando \_\_\_\_\_ Kodo, urbo \_\_\_\_\_  
Loĝadreso \_\_\_\_\_  
Retadreso \_\_\_\_\_ Fakso \_\_\_\_\_  
Telefono \_\_\_\_\_ Poŝtelefono \_\_\_\_\_
- Naskiĝdato (jjjj-mm-tt) \_\_\_\_\_ Profesio \_\_\_\_\_
- Mi kotizas \_\_\_\_\_ EUR kiel (elektu unu el la kotizkategorioj):  
☐ membro de ILEI, ☐ ne membro, ☐ junulo, ☐ handikapulo.
- Mi kontribuas \_\_\_\_\_ EUR por ILEI-agado tra jena(j) kaso(j) / fonduso(j)  
/ agado(j): \_\_\_\_\_
- Mi konsentas / ne konsentas (forstreku unu), ke mia adreso aperu en la  
listo de partoprenantoj!
- Mi komprenas, ke la aliĝo validas nur post kompleta pago en unu el la  
jenaj manieroj (indiku vian pagmanieron):
  - ☐ EU-pago al: ILEI, IBAN: NL55INGB 0004676855, BIC: INGBNL2A.  
Aldonu 5 € por bankokostoj se vi pagas de ekster Eŭropa Unio.
  - ☐ El Svedio, al konto 8327-9, 994 515 014-3 ĉe Swedbank.
  - ☐ El Nederlando, al konto 4676855 ĉe ING Bank N.V.
  - ☐ Al ILEI-konto ĉe UEA *ilek-a*, indikante "ILEI-konferenco 2011"
  - ☐ El Danio, al Arne Casper, Danske Bank reg: 1551, konto 10019621.
- **Mi komprenas kaj akceptas la partoprenkondiĉojn kaj regulojn.**
- Mi bezonas / ne bezonas invitilon kiel civitano de \_\_\_\_\_  
kun pasporton n-ro \_\_\_\_\_ valida ĝis \_\_\_\_\_

**Loko, dato** \_\_\_\_\_ **Subskribo** \_\_\_\_\_

## Kontribuproponoj

- Rilate al la konferenca temo mi proponas jenan prelegon (bonvolu indiki se vi bezonas por via prelego iujn apartajn ilojn):

---

- Mi volas prezenti \_\_\_\_\_lingvon en la Lingva Festivalo.
- Mi proponas jenan kontribuon por la distra programo (bonvolu indiki se vi bezonas por via programero iujn apartajn ilojn):

---

- Aliaj komentoj \_\_\_\_\_

---

## Mendilo

- **Mi mendas loĝadon kun matenmanĝo** en \_\_\_\_-lita ĉambro en la \_\_\_\_\_ por \_\_\_\_ noktoj ekde la \_\_\_\_-a ĝis la \_\_\_\_-a de julio 2011 kontraŭ \_\_\_\_ EUR por unu nokto, entute pagenda sumo \_\_\_\_ EUR. Mi loĝos kun \_\_\_\_\_

---

- **Mi aliĝas al la bankedo** kontraŭ 55/45 EUR (elektu laŭ via lando). Mi manĝas ☐ ordinare / ☐ \_\_\_\_\_

- **Mi aliĝas al ekskursoj** (indiku kiuj):

☐ TT1, merkredo: Kronborg, Louisiana, Frederiksborg (80 EUR).

☐ TT2, vendredo: Vikingaj tempoj kaj Roskilde (80 EUR).

☐ DT1, merkredo: Buse tra Kopenhago kun vizito al Rosenborg (38 EUR)

☐ DT2, merkredo: Ŝipe tra la kanaloj (16 EUR)

☐ DT3-M, merkredo: Promene tra Kopenhago (5 EUR)

☐ DT3-V, vendredo: Promene tra Kopenhago (5 EUR)

- **Mi legis, komprenas kaj akceptas la enhavon kaj kondiĉojn de la servoj kiujn mi mendis.**

- La tutan sumon de \_\_\_\_ EUR por la mendoj mi pagis / pagos sammaniere kiel la kotizon, laŭ la indikoj en mia aliĝilo.

**Loko, dato** \_\_\_\_\_ **Subskribo** \_\_\_\_\_

## Aliĝoj kaj mendoj

Prefere kaj laŭeble bonvolu uzi la retan aliĝilon kun mendilo:

<http://ilei.info/konferenco/alighilo2011.php>

Se vi tamen volas uzi la paperan aliĝilon, bonvolu sendi ĝin al la estrarano pri konferencoj:

*Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36, RS-32000 Ĉaĉak, Serbio*

*Nia konferenco en Matanzas malfermis multajn eblojn. Ni membrigis en la Ligo ĉiun kuban partopreninton kaj preleginton, same kiel plurajn seminarianojn el diversaj latin-amerikaj landoj. Ni volas ke tiu konekto ne estu rompita fine de la jaro, sed pluiru ankaŭ tra 2011. Por permesi tion, nia Koleghelpa Kaso bezonas pli da rimedoj. Via donaco helpas al ni firmigi la tutmondecon de nia Ligo. La kolofono indikas la vojon donaci. Verkante viajn novjarajn rezoluciojn, pensu pri la Koleghelpa Kaso! Antaŭdankon!*

## Informoj pri ILEI

### Laborkomisionoj

**Ekzamena:** Mireille Grosjean (prezidanto), Mónika Molnár (vicprez.), Reza Torabi (sekretario), Karine Arakelian, Giridhar Rao, Jérémie Sabiyumva, Han Zuwu

**Elekta:** Aurora Bute (gvid.), Tieko Isikawa, Ana Montesinos de Gomis

**Kontrola:** Ulla Luin, Simon Smits, Rudi Koot

**Lerneja:** Julián Hernández (gvid.), Carola Antskog, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Tieko Isikawa, Marija Jerković, Luigia Madella, Jacqueline Poux, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi

**Regulara:** Marija Belošević, Rob Moerbeek, Atilio Orellana Rojas (Estrare: Stefan MacGill)

**Terminara:** Miroslav Malovec, Ilona Koutny (Estrare: Radojica Petrović)

**Universitata:** Duncan Charters (gvid.), Aida Čížikaitė, Renato Corsetti, Ilona Koutny, Radojica Petrović, Kristin Tytgat

### Kunlaborantaj institucioj

**EEU:** *Eŭropa Esperanto-Unio*. Komisiito pri instruado kaj rilatoj kun ILEI: **Carola Antskog**, Brokärrvägen 89, FI-25700 Kimito, Finnlando, [cantskog@kolumbus.fi](mailto:cantskog@kolumbus.fi).

**E@I** (*Edukado ĉe Interreto*): Viťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, [info@ikso.net](mailto:info@ikso.net). Tel: +421 902 203 369. Retejo: <http://www.ikso.net/eo/>.

**Fondaĵo edukado.net** - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj  
Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74. NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando. Retadreso: [redaktanto@edukado.net](mailto:redaktanto@edukado.net).



**ICH** (Interkultura Centro Herzberg): DE-37412 Herzberg am Harz, Grubenhagenstr. 6, 0049-55215983, Trejnsesioj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, [zsolia.korody@esperanto.de](mailto:zsolia.korody@esperanto.de).

**FIPLV** (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj*): Repr. de ILEI: **Stefan MacGill**.

**TEJO** (<http://www.tejo.org/>): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Radojica Petrović**. Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Gregor Hinker**.

**UEA**: *Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando*. [www.uea.org](http://www.uea.org). Observanto kaj A-komitatano de ILEI ĉe UEA: **Stefan MacGill**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Claude Nourmont**.

**UN** (Unuiĝintaj Nacioj): komisiito ĉe ILEI: **Rob Moerbeek**.

**UNESKO** (en neformalaj rilatoj): Reprezentantoj de ILEI: **François Lo Jacomo**, 72, *quai de la Loire, FR-75019 Paris*, [francois.lojacomo@wanadoo.fr](mailto:francois.lojacomo@wanadoo.fr); **Monique Arnaud**, *Ecole Chemin de l'Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac*, [monique.arnaud@aliceadsl.fr](mailto:monique.arnaud@aliceadsl.fr); **Jean-Pierre Boulet**, 17 Av. de la Dordogne, FR-63800 Cournon d'Auvergne, tel.: (+33) 4 73 84 90 60.

## Membreco kaj pagado por aliaj servoj

**Membreco kostas 18 EUR en A-landoj** (laŭ UEA-difino) **kaj 9 EUR en B-landoj**, kun ricevo de 4 numeroj de *IPR* jare. Kun aliro nur al reta versio, membreco kostas 8 EUR por la A-landoj kaj 4 EUR por la B-landoj. Bonvenaj estas donacoj al la fondaĵoj de ILEI, konferencaj pagoj kaj abonoj por *Juna amiko*. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas membrigojn kaj donacojn; simile, perantoj por *Juna amiko* akceptas abonojn enlande. Por pagoj rekte al la internacia ILEI informu skribe al Julija BATRAKOVA, p/a Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, <[persiko@mail.ru](mailto:persiko@mail.ru)>.

La pagoj povas okazi pere de la nederlanda ILEI-konto, al la ILEI-konto ĉe UEA aŭ al la sveda konto:

- \* Pagoj al la nederlanda konto de ILEI: numero 4676855 ĉe ING Bank N.V., IBAN NL55INGB 0004676855, BIC INGBNL2A. Bv. aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo).
- \* Pagoj al konto de ILEI ĉe UEA: Pri pagmanieroj vidu informojn en la Jarlibro de UEA. Atentu pri aldono de sumo por bankkostoj. Indiku viajn nomon kaj landon, mallonge la celon de la pago, kaj unu el la tri kontoj ilek-a (ĝenerala), juna-l (*Juna amiko*), pike-b (projekto *Interkulturo*).
- \* Pagoj al la sveda bankkonto: El Svedio pagu al konto 8327-9, 994 515 014-3 ĉe Swedbank. El aliaj landoj pagu al IBAN SE56 8000 0832 7999 4515 0143 kun BIC/SWIFT-kodo SWEDSESS. Aldonu 6 eŭrojn por svedaj bankkostoj se vi pagas el ekster Eŭropa Unio.
- \* Simpla abono de IPR sen membreco: 18 EUR. Reklamtarifoj por IPR: 180 EUR por plena, 110 EUR por duona kaj 70 por kvarona paĝoj. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon: kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag sub numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo. Hejmpaĝo de ILEI: <http://www.ilei.info>.

## Redakciaj informoj

**Respondeca eldonanto** (verantw. uitgever): Iwona KOCIEBA, *Graaf de Fiennesln 54, BE-2650 Edegem*. **Presado**: Flandra Esperanto-Ligo, *Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen*, tel.: (+32-3)-234 34 00. **Redaktejo**: NÉMETH József, *HU-8531 IHÁSZ, Fő u. 41/5*, <[jozefo.nemeth@gmail.com](mailto:jozefo.nemeth@gmail.com)>, <http://www.ilei.info/ipr/>; tel.: (+36-89) 356-050. La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj. Informas: Rob MOERBEEK, *Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk*, <[r.moerbeek@wanadoo.nl](mailto:r.moerbeek@wanadoo.nl)>.

**La nunan numeron ni sendis al la presejo 3 decembro 2010,  
redaktofino por la sekva numero 15 januaro 2011.**



*Projekto Mondo-Rondo en Afriko (p.16)*



*TORPEDO-6 en Germanio (p.32, 34.)*



